

# Budhisma kateĥismo

de

Henry S. Olcott

traduko:

Gunnar Gällmo

Origina titolo: *The Buddhist Catechism*

© originalo: libera (la aŭtoro mortis en 1907)

© traduko: Gunnar Gällmo 2018

La traduko sekvas la 42:an anglalingvan eldonon de 1908

Eldonita de la tradukinto tra lulu.com

Pliaj ekzempleroj de la libro mendeblas ĉe  
<http://www.lulu.com/gunnargallmo>

Per Lulu eldoniĝis ankaŭ

*Suttanipāta 1: Uragavagga*

*Suttanipāta 2: Culavagga*

*Suttanipāta 3: Mahāvagga*

*Suttanipāta 4: Atthakavagga*

*Suttanipāta 5: Pārāyanavagga*

*Khuddakapātha – la mallonga teksto*

*La parolo de la Budho al Sigala*

*La granda meditadosutro*

*La Kalama-sutro*

*La du unuaj paroloj de la Budho*

*La parolo de Sariputta pri ĝusta rigardado*

*La lastaj tagoj de la Budho*

kaj ĉe Eldona Societo Esperanto

*La Dharmo-pado*



## **Enhavo**

1. La vivo de la Budho 4
  2. La dharmo aŭ doktrino 34
  3. La sangho 88
  4. La ekesto kaj disvastiĝo de la budhismo 98
  5. Budhismo kaj scienco 112
- Apendico 130
- Bibliografio 140

# 1. La vivo de la Budho

1. *Demando: De kiu religio vi estas?*

Respondo: La budhisma.

[La vorto "religio" estas tre netaŭga kiam temas pri la budhismo, kiu ne estas religio sed moralfilozofio, kiel mi montros poste. Sed pro ĝenerala uzado, la vorton oni ekuzis pri ĉiuj homgrupoj kiuj praktikas certan moraldoktrinon, kaj tiel ĝin uzas statistikistoj. La sinhalaj budhanoj ĝis nun neniam havis koncepton similan al tiu celata de eŭropanoj per la etima konstruo de la latina radiko por tiu termino. En ilia kredo, nenio "re-ligas" en la kristana signifo de la vorto – nenio devigas nin klini nin antaŭ iu dio aŭ kunfandiĝi kun ĝi. *Agama* estas la vorto en ilia gepatra lingo por esprimi ilian rilaton al la budhismo kaj al la Budho. Tio estas pura sanskrito, kaj signifas "alvenon", kaj ĉar "Budho" signifas "iluminiĝinton", la kunmetita vorto kiun ili uzas por la budhismo – *Buddhagama* – povas esti korekte tradukata per "veno al la luminiĝo", aŭ eble per "sekvi la doktrinon de Sakjamunio". Kiam la misiistoj trovis ke la vorto *agama* estis disponebla kaj uzebla, ili ekuzis ĝin kiel tradukon de "religio", kaj "kristanisman" ili tradukis per *Kristianiagama*, kvankam devus esti *Kristiani bandhana*, ĉar "bandhana" estas la etima ekvivalento de "religio". La nomo *vihajja-vadi* – "analizanto" – estas alia vorto por budhano, kaj *advaya-vadi* estas tria. Kun tiu klarigo, mi daŭre sub protesto uzos la ĝenerale konatan vorton kiam mi parolas pri budhisma filozofio, por helpi la ordinaran leganton.]

*2. Demando: Kio estas la budhismo?*

Respondo: Doktrinaro prezentata de la granda persono konata kiel la Budho.

*3. Demando: Ĉu "budhismo" estas la plej taŭga nomo de tiu doktrino?*

Respondo: Ne, tio estas nur okcidenta termino. La plej bona nomo estas *budha dharmo*.

*4. Demando: Ĉu vi nomus iun "budhano" nur ĉar li havas budhismajn gepatrojn?*

Respondo: Certe ne. Budhano estas tiu kiu ne nur diras ke li kredas je la Budho kiel la plej nobla instruisto, je la doktrino de li predikata kaj je la frataro de la arahantoj, sed kiu ankaŭ sekvas liajn regulojn en la ĉiutaga vivo.

*5. Demando: Kiel oni nomas viran budhisman laikon?*

Respondo: *Upasaka*.

*6. Demando: Kaj virinan?*

Respondo: *Upasika*.

*7. Demando: Kiam tiu doktrino estis unue prezentata?*

Respondo: Ne ĉiuj samopinias pri ekzakte kiam, sed laŭ la sinhalaj tekstoj estis en la jaro 2531 de la (nuna) *kali-yuga*.

*8. Demando: Diru la plej gravajn momentojn en la lasta naskiĝo de la fondinto!*

Respondo: Li naskiĝis sub la stelgrupo *Visa* dum mardo en marto, en la jaro 2478 (*kali-yuga*); li retiris sin al la pluvarbaro en la jaro 2506; li iĝis Budho en 2513; forlasis la rondon de renaskiĝoj kaj atingis parinivanon en 2558, 80-jara. Ĉiu el tiuj eventoj okazis dum plenluna tago, do ili estas festataj samtempe dum la granda solenaĵo je la plenuna tago en la monato vesako (*vaisakha*), kiu korespondas al majo.

*9. Demando: Ĉu la Budho estis dio?*

Respondo: Ne. La budha dharmo diras nenion pri "dia" enkarniĝo.

*10. Demando: Ĉu li estis homo?*

Respondo: Jes, sed la plej saĝa, nobla kaj sankta estaĵo kiu evoluigis dum sennombraj naskoj, multe pli ol ĉiuj aliaj estaĵoj, krom nur antaŭaj budhoj.

*11. Demando: Ĉu vivis aliaj budhoj antaŭ li?*

Respondo: Jes, kiel estas klarigote.

*12. Demando: Ĉu "Budho" estis lia nomo?*

Respondo: Ne. Estas la nomo de mensa stato, de la menso evoluinta al la plej alta nivelo.

*13. Demando: Kion ĝi signifas?*

Respondo: Ilumiĝinto, aŭ tiu kiu posedas perfektan saĝon. Palie, oni diras *sabbaññu*, iu kiu posedas senliman konon. Sanskrite, oni diras *sarvajña*.

*14. Demando: Kiu do estis la vera nomo de la Budho?*

Respondo: *Siddhartha* aŭ *Siddhattha* estis lia reĝa nomo, kaj *Gaŭtama* aŭ *Gotama* estis lia familia nomo, Li estis princo de Kapilavastu



(Kapilavatthu) kaj apartenis al la fama familio *Okkaka*, de la gento de la suno.

*15. Demando: Kiuj estis liaj gepatroj?*

Respondo: La reĝo Suddhodana kaj la reĝino Maja, nomita Maha Maja.

*16. Demando: De kiu popolo li estis reĝo?*

Respondo: Sakja, tribo en la kŝatrio-kasto.

*17. Demando: Kie situis Kapilavastu?*

Respondo: En Hindio, cent anglajn mejlojn nordoriente de la urbo Banaraso kaj ĉirkaŭ kvardek anglajn mejlojn for de Himalajo. Nun estas tie la suda parto de Nepalo. La urbo nun estas en ruinoj.

*18. Demando: Ĉe kiu rivero?*

Respondo: Rohini, kies nuna nomo estas Kohana.

*19. Demando: Diru denove kiam naskiĝis la princo Siddhartha!*

Respondo: En la jaro 623 p. Kr.

*20. Demando: Ĉu la ekzakta loko estas konata?*

Respondo: Ĝi nun estas konstatita sen ajna dubo. Arkeologo en la servo de la hinda registaro trovis, en la sudnepala pluvarbaro, ŝtonan kolonon starigitan de la granda budhisma reganto Asoko, por indiki ĝuste tiun lokon. Tiutempe, oni nomis ĝin "la ĝardeno de Lumbini".

*21. Demando: Ĉu la princo vivis same lukse kiel aliaj princoj?*

Respondo: Jes. Lia patro, la reĝo, konstruigis al li tri grandiozajn palacojn, por la tri sezonoj de Hindio: la vintro, la somero kaj la pluvado, kun naŭ, kvin respektive tri etaĝoj, kaj bele ornamitaj.

*22. Demando: Kiel aspektis ĉirkaŭ ili?*

Respondo: Ĉirkaŭ ĉiu palaco estis ĝardenoj kun la plej belaj kaj bonodoraj floroj, kun akvoplenaj fontanoj, kun arboj plenaj je kantantaj birdoj, kaj pavoj brustoŝvelantaj.

*23. Demando: Ĉu li vivis sola?*

Respondo: Ne. Deksesjara, li edziĝis al la princino Yasodhara, filino de la reĝo Supprabuddha. Ankaŭ multaj belaj knabinoj, spertaj pri dancado kaj muziko, ĉiam estis tie por amuzi lin.

*24. Demando: Kiel li ekhavis sian edzinon?*

Respondo: Laŭ la malnova maniero de la kŝatrio- aŭ militistkasto, venkante ĉiujn konkurantojn pri sportoj kaj spertoj, kaj poste elektante Yasodharan el ĉiuj junaj princinoj, kies patroj venigis ilin al la turniro.

*25. Demando: Kiel princo povis iĝi tutsaĝa en tia lukso?*

Respondo: Li posedis tian naturan saĝecon, ke li jam kiel infano ŝajne komprenis ĉiun arton kaj sciencon preskaŭ sen studi ĝin. Li havis la plej bonajn instruistojn, sed tiuj ne povis al li instrui ion kion li ne ŝajnis tuj kompreni.

*26. Demando: Ĉu li iĝis budho en sia grandioza palacoj?*

Respondo: Ne. Li lasis ĉion kaj iris sola en la pluvarbaron.

*27. Demando: Kial li faris tion?*

Respondo: Por trovi la kialon de niaj suferoj, kaj la manieron eviti ilin.

*28. Demando: Ĉu ne estis egoisme de li agi tiel?*

Respondo: Ne, senlima amo al ĉiuj estaĵoj instigis lin agi por ilia bono.

*29. Demando: Sed kiel li evoluigis tiun senliman amon?*

Respondo: Dum sennombraj naskoj kaj eraroj li kultivis tiun amon, kun firma decido iĝi budho.

*30. Demando: Kion li ĉifoje rezignis?*

Respondo: Siajn belajn palacojn, siajn riĉaĵojn, sian lukson, siajn distrojn, siajn molajn litojn, siajn bonajn vestaĵojn, sian bonan manĝon kaj sian regnon; li lasis eĉ sian amatan edzinon kaj sian solan filon, Rahula.

*31. Ĉu iu alia homo iam rezignis tiel multe por*

*ni?*

Respondo: Ne en ĉi tiu erao. Tial, budhanoj amas lin tiom, kaj tial bonaj budhanoj provas simili al li.

*32. Demando: Sed ĉu ne multaj homoj rezignis ĉiujn terajn benojn, kaj eĉ la vivon mem, por siaj proksimuloj?*

Respondo: Certe. Sed ni kredas ke liaj sensuperitaj malegoismo kaj amo al la homaro montriĝis antaŭ sennombraj eraoj, kiam li naskiĝis kiel la brahmano Sumedha, en la tempo de Budho Dipankara. Tiam, li estis atinginta la stadion kie li povus eniri nirvanon, sed li amis la homaron pli ol sin mem. Per tiu rezigno, li libervole eltenis la dolorojn de la tera vivo ĝis li mem iĝis budho, por povi instrui al ĉiuj estaĵoj la vojon al liberiĝo kaj doni pacon al la mondo.

*33: Demando: Kiom aĝa li estis, kiam li iris en la pluvarbaron?*

Respondo: Li havis 29 jarojn.

*34. Demando: Kio finfine igis lin lasi ĉion kutime tiel karan al homoj, kaj iri al la*

*pluvarbaro?*

Respondo: Iu devao montris sin al li, kiam li eliris en sia veturilo, en kvar konvinkaj formoj, je kvar malsamaj okazoj.

[Vidu la difinon de "devao" poste!]

*35. Demando: Kiu estis tiuj malsamaj formoj?*

Respondo: Tre maljuna viro, kaduka pro aĝo, malsanulo, putranta kadavro, kaj digna ermito.

*36. Demando: Ĉu nur li vidis ilin?*

Respondo: Ne. Ankaŭ lia servisto Ĉanna vidis ilin.

*37. Demando: Kial tiuj bildoj, tiel bone konataj al ĉiuj, instigis lin iri al la pluvarbaro?*

Respondo: Ni ofte vidas tiajn aferojn, sed li ne vidis ilin, do ili forte impresis lin.

*38. Demando: Kial ne ankaŭ li vidis ilin?*

Respondo: Kiam li naskiĝis, brahmanaj astrologoj antaŭdiris ke li iutage rezignos sian

regnon kaj iĝos Budho. La reĝo, lia patro, ne volis perdi tronheredonton, do li zorge certigis ke lia filo ne vidos ion, kiu povus montri al li homan suferadon kaj morton. Neniu rajtis eĉ paroli kun la princo pri tiaj aferoj. Li estis preskaŭ malliberulo en siaj belaj palacoj kaj ĝardenoj. Ĉirkaŭ ili staris altaj muroj, kaj inter ili ĉio estis beligita tiom kiom eblis, por ke li ne volu eliri kaj vidi la ĉagrenon kaj suferadon en la mondo.

*39. Demando: Ĉu li estis tiel bonkora, ke la reĝo prave kredis ke li povos lasi ĉion por la bono de la mondo?*

Respondo: Jes. Evidente, li havis tiel grandan amon kaj kompaton al ĉiuj estaĵoj.

*40. Demando: Kaj kiel li esperis trovi la kaŭzon de la ĉagreno en la pluvarbaro?*

Respondo: Per foriro plejeble longe de ĉio, kio povus malhelpi lin pensi profunde pri la kaŭzoj de ĉagreno kaj la naturo de la homo.

*41. Demando: Kiel li fuĝis el la palaco?*

Respondo: Iun nokton, kiam ĉiuj dormis, li

ellitiĝis, lastan fojon rigardis sian dormantan edzinon kaj sian etan filon, vokis Ĉannan, eksidis sur sian blankan preferatan ĉevalon Kanthaka kaj rajdis al la pordo de la palaco. Devaoj profunde dormigis la pordogardistojn de la reĝo, do tiuj ne povis aŭdi la sonon de la paŝoj de la ĉevalo.

*42. Demando: Sed la pordo certe estis ŝlosita?*

Respondo: Jes, sed devaoj tamen sukcesis malfermi ĝin tute silente, kaj li forrajdis en la mallumo.

*43. Demando: Kien li iris?*

Respondo: Al la rivero Anoma, malproksime de Kapilavastu.

*44. Demando: Kion li faris poste?*

Svar: Li saltis el la ĉevalo, tranĉis siajn belajn harojn per la glavo, vestis sin per la robo de asketo, donis siajn ornamatojn kaj sian ĉevalon al Ĉanna, kaj ordonis al li kunporti tiujn al lia patro, la reĝo.

*45. Demando: Kaj poste?*



Respondo: Poste, li pluiris piede al Raĝagriha aŭ Raĝagaha, la ĉefurbo de la reĝo Bimbisara en Magadho.

*46. Demando: Kiu vizitis lin tie?*

Respondo: La reĝo kaj lia tuta kortego.

*46a. Demando: Kien li iris de tie?*

Respondo: Al Uruvela, proksime al la nuna Mahabodhi-templo en Buddhagaja.

*47. Demando: Kial li iris tien?*

Respondo: En la arbaroj vivis ermitoj – tre saĝaj homoj, kies disĉiplo li poste iĝis, esperante trovi la konon kiun li serĉis.

*48. Demando: De kiu religio ili estis?*

Respondo: La hindua. Ili estis brahmanoj.

[La termino ”hinduo” komence estis malestima vorto kiun la islamanoj uzis pri la homoj de Sindh, kiun ili konkeris, sed nuntempe ĝi estas faktermino.]

*49. Demando: Kion ili instruis?*

Respondo: Ke homo povas atingi perfektan saĝecon per severa pentofarado kaj turmentado de la korpo.

*50. Demando: Ĉu la princo trovis ke estas tiel?*

Respondo: Ne. Li lernis ilian sistemon, kaj praktikis ĉiujn iliajn pentofarojn, sed li ne povis trovi la kaŭzon de la homa suferado kaj la vojon al plena liberiĝo.

*51. Demando: Kion li faris poste?*

Respondo: Li iris en la arbaron proksime al Uruvela. Tie, li pasigis ses jarojn en profunda meditado kaj turmentis sian korpon kun la plej severa disciplino.

*52. Demando: Ĉu li estis sola?*

Respondo: Ne. Kvin brahmanoj akompanis lin.

*53. Demando: Kiu estis iliaj nomoj?*

Respondo: Kondañña, Bhaddiya, Vappa, Mahanama kaj Assaji.

*54. Demando: Kiun disciplinplanon li akceptis por malfermi sian menson al kono de la tuta vero?*

Respondo: Li sidis meditante, koncentris sin pri la altaj vivproblemoj kaj evitis vidi kaj aŭdi ĉion kio povus interrompi lian internan pripensadon.

*55. Demando: Ĉu li fastis?*

Respondo: Jes, dum la tuta periodo. Li manĝis kaj trinkis ĉiam malpli, ĝis onidire li manĝis apenaŭ pli ol unusolan grajnon da rizo aŭ sezamo tage.

*56. Demando: Ĉu tio donis al li la saĝecon kiun li sopiris?*

Respondo: Ne. Li iĝis ĉiam pli maldika, ĉiam pli malforta, ĝis iun tagon, kiam li malrapide piediris tien kaj reen meditante, lia vivforto subite lasis lin kaj li falis teren senkonscia.

*57. Demando: Kion opiniis liaj kunuloj pri tio?*

Respondo: Ili kredis ke li mortis, sed post iom da tempo li ree vekiĝis.

*58. Demando: Kaj poste?*

Respondo: Tiam li pensis ke kono neniam atingeblas per nur fastado kaj korpa suferado, sed postulas ke oni malfermu sian menson. Li ĵus preskaŭ mortis pro malsato, kaj tamen li ne atingis la perfektan saĝecon. Do li decidis manĝi, por povi vivi almenaŭ sufiĉe longe por iĝi saĝa.

*59. Demando: Kiu donis al li manĝon?*

Respondo: Manĝon donis al li Sujata, filino de nobelulo, kiu vidis lin sidi ĉe la radiko de banjan-arbo. Li ekstaris, prenis sian almozbovlon, banis sin en la rivero Neranĝara, manĝis kaj iris en la pluvarbaron.

*60. Demando: Kion li faris tie?*

Respondo: Post tiu pripensado, li faris sian decidon, kaj vespere li iris al la bodhi-arbo, kie la Mahabodhi-templo situas hodiaŭ.

*61. Demando: Kion li faris tie?*

Respondo: Li decidis ne forlasi la lokon ĝis li atingis perfektan saĝecon.

*62. Demando: Ĉe kiu flanko de la arbo li sidiĝis?*

Respondo: Ĉe la orienta.

[En la kanonaj libroj ne estas donita iu kialo de la elekto de tiu flanko de la arbo, sed oni povas trovi klarigon en la popollegendoj, sur kiuj la episkopo Bigandet kaj aliaj eŭropaj komentariistoj, bazis siajn librojn, Ni ĉiam estas la celo de certaj influoj el pluraj direktoj – foje ĉefe el unu direkto, foje el alia. Sed la Budho opiniis ke la perfektiginta homo staras super ĉiuj eksteraj influoj.]

*63. Demando: Kion li atingis dum tiu nokto?*

Respondo: Konon pri siaj antaŭaj naskiĝoj, kaj pri la maniero estingi deziron. Tuj antaŭ la matenkrepusko la postan tagon, lia menso tute malfermiĝis, kiel plene evoluinta lotusfloro; la lumo de la plej alta kono, la kvar noblaj veroj, fluis super lin. Li iĝis Budho – ilumiĝinto, tutkonanto – *Sarvajña*.

*64. Demando: Ĉu li fine trovis la kaŭzon de homa suferado?*

Respondo: Jes. Kiel la lumo de la matena suno forĉasas la mallumon de la nokto kaj lumigas la arbojn, kampojn, rokojn, marojn, riverojn,

bestojn, homojn kaj ĉiujn aferojn, tiel la plena lumo de la kono ekbrilis en lia menso, kaj li subite vidis la kialojn de homa suferado kaj la manieron fuĝi de ili.

*65. Demando: Ĉu li multe luktis antaŭ gajni tiun perfektan saĝecon?*

Respondo: Jes, multege. En sia propra korpo li devis venki ĉiujn naturajn mankojn kaj homajn dezirojn, kiuj malhelpas nin vidi la veron. Li devis venki ĉiujn mabonajn influojn el la mankohava mondo ĉirkaŭ li. Kiel militisto batalanta fervore kontraŭ multaj malamikoj, tiel li luktis; kiel konkeranta heroo li atingis sian celon, kaj la sekreto de homa suferado estis malkaŝata.

*66. Demando: Kiel li uzis la konon tiel gajnitan?*

Respondo: Komence, li hezitis instrui ĝin al ordinaraj homoj.

*67. Demando: Kial?*

Respondo: Pro ĝia profunda signifo kaj sublimeco. Li timis ke nur malmultaj homoj komprenos ĝin.

*68. Demando: Kio instigis lin ŝanĝi opinion?*

Respondo: Li komprenis ke estas lia devo instrui tion, kiun li mem komprenis, plejeble klare kaj simple, kaj fidi ke la vero eniros la mensojn de ordinaraj homoj proporcie al ĉies individua karmo. Tio estis la sola vojo al liberiĝo, kaj ĉiu estaĵo havis la saman rajton havi ĝin klarigata. Tial li decidis unue paroli al siaj kvin antaŭaj kunuloj, kiuj forlasis lin kiam li komencis manĝi.

[Laŭ malnova legendo estis la dio Brahmo mem, kiu petis lin ne prisilenti la mirindan veron.]

*69. Demando: Kie li trovis ilin?*

Respondo: En la cervoparko en Isipatana, proksime al Banaraso.

*70. Demando: Ĉu oni povas trovi tiun lokon hodiaŭ?*

Respondo: Jes, stupao parte en ruinoj ankoraŭ staras ĝuste tie.

*71. Demando: Ĉu liaj kvin kunuloj estis pretaj aŭskulti lin?*

Respondo: Komence ne, sed tiel granda estis lia spirita beleco, kaj tiel konvinka lia instruado, ke ili baldaŭ ŝanĝis opinion kaj plene atentis lin.

*72. Demando: Kiun efikon lia instruado havis al ili?*

Respondo: La malnova Kondañña, aŭ ”Kondañña kiu komprenis” (*Añña Kondañña*), estis la unua kiu venkis siajn antaŭjuĝojn kaj eniris la vojon al arahanteco. La ceteraj kvar baldaŭ sekvis lian ekzemplon.

*73: Demando: Kiun li poste konvertis?*

Respondo: Riĉan, junan laikon nomitan Yasa, kaj lian patron, kiu estis bonhava komercisto. Post tri monatoj, li havis sesdek disĉiplojn.

*74. Demando: Kiuj estis la unuaj laikaj disĉiplinoj?*

Respondo: La patrino kaj edzino de Yasa.

*75. Demando: Kion la Budho faris tiam?*

Respondo: Li kunigis siajn disĉiplojn, donis al



ili plenajn instrukciojn kaj dissendis ilin al ĉiuj direktoj por disvastigi lian doktrinon.

[Ĉar la brahmanismon ne estis proponata al ne-hinduoj, do la budhismo estas la unua misianta religio en la mondo. La fruaj misiistoj eltenis ĉiujn malfacilaĵojn, kruelaĵojn kaj persekutojn kun neŝancebla kuraĝo.]

*76. Demando: Kio estis ĝia esenca enhavo?*

Respondo: Ke oni atingas liberiĝon vivante la sanktan vivon kaj sekvante ĝiajn regulojn, kiel klarigote.

*77. Demando: Diru kiun nomon li donis al tiu vivovojo!*

Respondo: La nobla okera vojo.

*78. Demando: Kiel oni diras tio palie?*

Respondo: *Ariya atthangika magga.*

*79. Demando: Kien la Budho poste iris?*

Respondo: Al Uruvela.

*80. Demando: Kio okazis tie?*

Respondo: Li konvertis viron nomita Kashyapa, fama pro sia klero, kaj instruisto de "ĝatilaĵoj", granda sekto de fajroadorantoj. Ankaŭ ĉiuj tiuj iĝis liaj disĉiploj.

*81. Demando: Kiu iĝis la venonta granda disĉiplo?*

Respondo: La reĝo Bimbisara de Magadho.

*82. Demando: Kiuj du el la plej kleraj kaj amataj disĉiploj de la Budho estis konvertitaj je tiu tempo?*

Respondo: Sariputta kaj Moggallana, aŭ Shariputra kaj Maŭdgalyayana, pli frue la ĉefaj disĉiploj de la asketo Sanjaya.

*83. Demando: Pro kio ili iĝis konataj?*

Respondo: Sariputta pro sia profunda klereco (*prajña/pañña*), Moggallana pro siaj eksterordinaraj spiritaj fortoj (*iddhi*).

*84. Demando: Ĉu tiaj mirakloj estas supernaturaj?*

Respondo: Ne, ili estas naturaj por ĉiuj homoj, kaj eblas evoluigi ilin per certa ekzercado.

*85. Demando: Ĉu la Budho aŭdis ion el sia familio, kiun li forlasis?*

Respondo: Jes, post sep jaroj, kiam li vivis en Raĝagaha. Tiam lia patro, la reĝo Suddhodana, sendis al li mesaĝon kaj petis lin veni, por ke li povu revidi lin antaŭ sia morto.

*86. Demando: Ĉu li iris tien?*

Respondo: Jes. Lia patro, kun ĉiuj siaj parencoj kaj ministroj, venis por renkonti lin, kaj ricevis lin kun granda ĝojo.

*87. Demando: Ĉu li akceptis rehavi sian malnovan rangon?*

Respondo: Ne. Li klarigis tre ĝentile al sia patro ke la princo Siddhartha ne plu ekzistis, kiel tia, sed transformiĝis en Budhon, por kiu ĉiuj estaĵoj estis same parencaj kaj same karaj. Anstataŭ regi nur unu tribon aŭ nacion, kiel monda reĝo, li per sia dharmo gajnos la korojn de ĉiuj homoj kaj faros el ili siaj disĉiploj.

*88. Demando: Ĉu li renkontis Yasodharan kaj sian filon Rahula?*

Respondo: Jes. Lia edzino, kiu funebris lin kun profunda amo, ploris amare. Kaj ŝi forsendis Rahulan por peti sian heredaĵon, kiel filo de princo.

*89. Demando: Kio okazis?*

Respondo: Al ĉiuj li prezentis la dharmon kiel kuracilo por ĉiuj suferoj. Liaj patro, filo, edzino, Ananda (lia duonfrato), Devadatta (lia kuzo kaj bofrato) ĉiuj estis konvertitaj kaj iĝis liaj disĉiploj. Du aliaj famaj tiaj estis Anuruddha, kiu poste iĝis granda metafizikisto, kaj Upali, barbiro, kiu poste iĝis la plej granda aŭtoritato pri *vinaya*. Ambaŭ gajnis grandan famon.

*90. Demando: Kiu estis la unua bhikŝuino?*

Respondo: Prajapati, la onklino kaj vicpatrino de Siddhartha. Kune kun ŝi, Yasodhara kaj multaj aliaj virinoj estis akceptataj en la sangho kiel bhikŝuinoj aŭ monaĥinoj.

*91. Demando: Kiel efikis al la maljuna reĝo Suddhodana, kiam liaj filoj Siddhartha kaj*

*Ananda, lia nevo Devadatta, lia bofilino Yasodhara kaj lia nepo Rahula ekvivis religie?*

Respondo: Tio multe dolorigis lin kaj li plendis ĉe la Budho, kiu poste decidis pri regulo ke neniuj ekde tiam estu ordinata sen la konsento de siaj gepatroj, se tiuj vivas.

*92. Demando: Rakontu al mi pri la sorto de Devadatta!*

Respondo: Devadatta estis tre inteligenta, kaj li rapide progresis en la dharmo, sed li ankaŭ estis ekstreme glorama, komencis envii kaj malami la Budhon kaj finfine provis mortigi lin. Li ankaŭ instigis Ajatasattun, la filon de la reĝo Bimbisara, murdi sian noblan patron, kaj mem iĝi disĉiplo de Devadatta.

*93. Demando: Ĉu li iel damaĝis la Budhon?*

Respondo: Neniuj, sed la malbono, kiun li planis al li, trafis lin mem, kaj li mizere mortis.

*94. Demando: Dum kiom da jaroj la Budho instruadis?*

Respondo: Dum 45 jaroj, dum kiuj li faris

multajn prelegojn. Li kaj liaj disĉiploj kutimis vagadi kaj prelegi dum la ok sekaj monatoj, sed dum *vassa* – la pluvsezono – li kaj ili kutimis resti en la temploj konstruitaj por ili de reĝoj kaj aliaj bonhavaj disĉiploj.

*95. Demando: Kiu estis la plej famaj el tiuj temploj?*

Respondo: Jetavanarama, Veluvanarama, Pubbarama, Nigrodarama och Isipatanarama.

*96. Demando: Kiajn homojn konvertis li kaj liaj disĉiploj?*

Respondo: Homojn el ĉiuj klasoj, etnoj kaj kasto: raĝoj kaj kulioj, riĉuloj kaj malriĉuloj, potenculoj kaj sennpotenculoj, analfabetoj kaj klereguloj. Lia doktrino taŭgis al ĉiuj.

*97. Demando: Diru ion pri la forpaso de la Budho!*

Respondo: Post 45 jaroj kiel Budho, dum la plenluna tago en majo, sciante ke la fino proksimas, li vespere venis al Kusinara, loko ĉirkaŭ 120 anglajn mejlojn for de Banaraso. En la sal-arbaro de Malla, Upavartana en Kusinara,

inter du sal-arboj, lia lito estis metita kun la kapo norden, laŭ malnova kutimo. Li kuŝiĝis tie, kaj kun tute klara menso li donis siajn lastajn instruojn al siaj disĉiploj kaj adiaŭis ilin.

*98. Demando: Ĉu li ankaŭ ricevis novajn disĉiplojn dum tiuj lastaj horoj?*

Respondo: Jes, kaj tre gravan, tre kleran brahmanon nomitan Subhadra. Li ankaŭ instruis la princojn de Malla kaj iliajn sekvantojn.

*99. Demando: Kio okazis dum la matenkrepusko?*

Respondo: Li eniris internan staton nomitan *samadhi*, kaj de tie eniris nirvanon.

*100. Demando: Kiu estis liaj lastaj vortoj al siaj disĉiploj?*

Respondo: ”Tion mi diras al vi, ho bhikŝuoj: Dependajoj maljuniĝas. Strebadu zorgeme.”

*101. Demando: Kiujn konvinkajn pruvojn ni havas ke la Budho, estinta la princo Siddhartha, estis historia persono?*

Respondo: Lia ekzisto evidente estas same klare

pruvita kiel tiu de iu ajn alia antikva persono.

*102. Demando: Nomu kelkajn el la pruvoj!*

Respondo: 1. Atestoj de homoj kiuj konis lin persone.

2. La eltrovo de lokoj kaj restaĵoj de domoj menciitaj en rakontoj el lia tempo.

3. La roksurskribaĵoj, kolonoj kaj stupaoj faritaj je lia memor de regantoj vivantaj sufiĉe proksime al lia tempo por povi konfirmi la rakonton pri lia vivo.

4. La seninterrompa ekzisto de la sangho de li fondita, kaj la kono pri faktoj pri lia vivo transdonita de generacio al generacio, ekde la komenco.

5. La fakto ke jam dum la jaro de lia morto, kaj poste je pluraj okazoj, la sangho havis kunvenojn kaj konciliojn por konfirmi kion la fundinto fakte instruis, kaj transdoni tiujn konfirmitajn instruojn de instruisto al lernanto, ĝis niaj tagoj.

6. Post lia kremacio, liaj relikvoj estis dividitaj



inter ok reĝoj, kaj stupao estis starigata super ĉiu parto. La parto donita al la reĝo Ajatasattu, kaj de tiu kovrita per stupao en Raĝagaha, estis post malpli ol ducent jaroj transprenata de la imperiestro Asoko, kaj dividata en lia tuta imperio. Kompreneble, li povis facile scii ĉu la relikvoj estis tiuj de la Budho ĉu ne, ĉar ilin jam dekomence prizorgis la reĝa familio de Patna.

7. Multaj el la disĉiploj de la Budho, kiuj estis arahantoj kaj do povis kontroli siajn vivpovojn, certe vivis ĝis alta aĝo, kaj nenio malhelpis ke du aŭ tri el ili, unu post la alia, kovris la tutan tempon inter la morto de la Budho kaj la regtempo de Asoko, kaj tiel ebligis al Asoko ricevi el siaj samtempuloj ĉiujn deziratajn atestaĵojn pri faktoj pri la de la Budho.

[Dum la dua koncilio partoprenis du disĉiploj de Ananda, do centjaraj, kaj dum la koncilio de Asoko partoprenis disĉiploj de tiuj disĉiploj.]

8. Mahavanso, la plej bone konfirmita antikva kroniko kiun ni konas, priskribas la sinhalan sinhalan historion ĝis la tempo de la reĝo Vijaya, 543 a. Kr. – preskaŭ la tempo de la Budho – kaj priskribas la plej multajn detalojn de lia vivo, same kiel tiujn de la imperiestro Asoko kaj aliaj

regantoj kun ligoj al la budhisma historio.

*105. Demando: Kiuj honorigaj nomoj estis uzataj pri la Budho?*

Respondo: *Sakyamuni* (la saĝulo de Sakja), *Sakya Sinha* (la leono de Sakas), *Sugata* (la bone evoluinta), *Sattha* (la instruisto), *Jina* (la venkanto), *Bhagava* (la sublimulo), *Loka-natha* (la protektanto de la mondo), *Sarvajña* (la ĉionsciantgo), *Dharmaraja* (Dharmo-reĝo), *Tathagata* (la tiel evoluinta) ktp.

## **2. La dharmo aŭ doktrino**

*106. Demando: Kion signifas la vorto "Budho"?*

Respondo: La lumiĝinto, aŭ tiu kiu posedas perfektan saĝecon.

*107. Demando: Vi diris ke vivis aliaj budhoj antaŭ ĉi tiu.*

Respondo: Jes, ni kredas ke en la eterna kaŭzoĉeno, regule naskiĝas iu budho kiam la homaro falis en mizeron pro nescio kaj bezonas la saĝecon, kies instruado estas la funkcio de budhoj.

*108. Demando: Kiel budho evoluas?*

Respondo: Homo, kiu aŭdas kaj vidas unu el la budhoj sur la tero, firme decidas vivi tiel, ke li povos en la estonteco, kiam li taŭgas al tio, mem iĝi budho por gvidi la homaron el la rondo de renaskiĝoj.

*109. Demando: Kiel li faras tion?*

Respondo: Dum tiu naskiĝo, kaj dum ĉiu posta, li strebas kvietigi siajn pasiojn, atingi saĝecon

per sperto, kaj evoluigi siajn altajn povojn. Tiel li iĝas ĉiam pli saĝa, lia karaktero pli nobla kaj lia virto pli forta, ĝis li fine, post sennombraj renaskiĝoj, atingas la staton kiam li iĝas perfekta, lumiĝinta, tutsaĝa, ideala instruisto por la homaro.

*110. Demando: Kiel ni nomas lin dum tiu grada evoluo dum ĉiuj tiuj naskiĝoj?*

Respondo: Bodhisatvo. La princo Siddhartha Gaŭtama do estis bodhisatvo ĝis la momento kiam li, sub la benita bodhi-arbo en Gaya, iĝis budho.

*111. Demando: Ĉu ni havas iujn rakontojn pri liaj renaskiĝoj kiel bodhisatvo?*

Respondo: *Jatakattakatha*, libro kun rakontoj pri la renaskiĝoj de la bodhisatvo, enhavas centojn da tiaj rakontoj.

*112. Demando: Kion ni povas lerni de tiuj rakontoj?*

Respondo: Ke homo, dum longa vico da renaskiĝoj, povas havi grandan, bonan celon kiu

ebligas al li venki mabonajn inklinojn kaj evolui virtajn.

*113. Demando: Ĉu ni povas scii kiom da renaskiĝoj bodhisatvo devas sperti antaŭ iĝi budho?*

Respondo: Kompreneble ne. Dependas de lia natura karaktero, de kiun evolunivelon li atingis kiam li decidis iĝi budho, kaj de kelkaj aliaj aferoj.

*114. Demando: Ĉu ni havas manieron klasifiki bodhisatvojn? Se jes, klarigu!*

Respondo: De bodhisatvoj – estontaj budhoj – ekzistas tri specoj.

*115. Demando: Daŭrigu! Kiel oni nomas tiujn tri specoj de bodhisatvoj?*

Respondo: *Paññadhika*, fondita sur saĝeco, *saddhadika*, fondita sur fido, kaj *viriyadhika*, fondita sur forto. La unua speco estas gvidata de inteligento kaj ne hastas; la dua estas plena de fido, kaj ne lasas sin gvidi de saĝeco; kaj la tria neniam hezitas fari bonon. Senkonsidere de la

sekvoj por li mem, li faras tion kiam li vidas ke preferas fari ĝin.

*116. Demando: Kiam nia bodhisatvo iĝis budho, kion li tiam vidis estas la kialo de la homa suferado? Diru tion per nur unu vorto!*

Respondo: Ne-scio (*avidya* aŭ *avijja*).

*117. Demando: Ĉu vi povas diri al mi la kuracilon?*

Respondo: Dispeli la nescion kaj gajni saĝecon (*prajña* aŭ *pañña*).

*118. Demando: Kial nescio iĝas kaŭzo de sufero?*

Respondo: Ĉar ĝi igas nin alte taksi aferojn senvalorajn, kaj sopiri tion kiu ne meritas tion, vidi kiel reala tion kiu estas ne reala sed nur iluzio, ĉasi la senvaloran kaj neglekti la vere valoran.

*119. Demando: Kaj kio estas plej valora?*

Respondo: Koni la tutan sekreton de la homa ekzisto kaj celo, por ke ni ne trotaksu ĉi tiun vivon kaj ĝiajn kondiĉojn, kaj por ne ni povu

vivi en maniero kiu certigas la plej multan eblan feliĉon kaj la malplej multan eblan suferon por niaj proksimuloj kaj por ni mem.

*120. Demando: Kiu lumo povas dispeli tiun nian ne-scion kaj forigi ĉiujn ĉagrenojn?*

Respondo: La kono pri la kvar noblaj veroj, kiel la Budho nomis ilin.

*121. Demando: Nomu tiujn kvar noblajn verojn!*

Respondo: 1. La suferado en la evoluo de la ekzisto kondukas al naskiĝo kaj morto, dum vivo post vivo. 2. La kaŭzo de tiu suferado, nome la egoisma deziro, ĉiam revivigata, kontentigi sin mem, sen iam povi atingi tiun celon. 3. La neniigon de tiu deziro, la distanciĝo de ĝi. 4. La maniero atingi tiun neniigon de la deziro.

*122. Demando: Diru kelkajn aferojn kiuj kaŭzas suferon!*

Respondo: Naskiĝo, maljuniĝo, morto, foresto de la kara, proksimeco de la malkara, deziro al la neatingebla.

*123. Demando: Ĉu tiuj aferoj varias de homo al homo?*

Respondo: Jes, sed ĉiuj homoj suferas de ili certgrade.

*124. Demando: Kiel ni povas eviti tiujn suferojn, kiuj estas la rezulto de nekontentigitaj deziroj kaj nesciantaj pasioj?*

Respondo: Tute venkante, kaj neniigante, tiun brulantan soifon al la vivo kaj ĝiaj ĝuoj, kiuj kaŭzas suferon.

*125. Demando: Kiel ni povas fari tion?*

Respondo: Sekvante la noblan okeran vojon, kiun la Budho trovis kaj montris al ni.

*126. Demando: Kion vi volas diri per tiuj vortoj? Kio estas la nobla okera vojo?*

Respondo: La ok partoj de tiu vojo estas nomataj *anga*. Ili estas: 1. ĝusta rigardado (pri la kaŭzoleĝo, aŭ karmo), 2. ĝusta pensado, 3. ĝusta parolado, 4. ĝusta agado, 5. ĝusta vivtenado, 6. ĝusta strebado, 7. ĝusta atentado, 8. ĝusta koncentrado. Kiu direktas sian menson al tiuj,



kaj sekvas ilin, tiu liberiĝas de suferado, kaj fine atingas la savon.

*127. Demando: Ĉu vi povas doni pli bona vorto pri savo?*

Respondo: Jes, liberiĝo.

*128. Demando: Liberiĝo de kio?*

Respondo: Liberiĝo la suferoj de la tera ekzisto kaj renaŝiĝoj, kiuj ĉiuj dependas de ne-scio kaj malpuraj deziroj.

*129. Demando: Kaj kiam ni atingis tiun savon aŭ liberiĝon, kion ni tiam atingis?*

Respondo: Nirvanon.

*130. Demando: Kio estas nirvano?*

Respondo: Stato kie ĉiu ŝanĝo ĉesis, stato de perfekta ripozo, de foresto de deziro kaj iluzio kaj ĉagreno, la totala forigo de ĉio kio kune konsistigas la korpan homon. Ĝis iu homo atingas nirvanon, li ĉiam renaskiĝas; atinginte nirvanon, li ne plu renaskiĝas.

*131. Demando: Kie oni povas trovi kleran diskuton pri la vorto nirvano, kaj liston de aliaj nomoj, kiujn la antikvaj pali-verkistoj uzis por difini ĝin?*

Respondo: En la pali-angla vortaro de I R. C. Childers troveblas plena listo.

[Childers havis tre pesimisman opinion pri nirvano, kaj rigardis ĝin kiel neniigon. Postaj studoj faris alian konkludon]

*132. Demando: Sed kelkaj imagas nirvanon kiel ian ĉielon aŭ paradizon. Ĉu la budhismo instruas tion?*

Respondo: Kiam Kutadanta demandis la Budhon: ”Kie estas nirvano?” tiu respondis: ”Ĉie kie la reguloj estas obeataj.”

*133. Demando: Pro kio ni renaskiĝas?*

Respondo: Pri la nekontentigita egoisma deziro (sanskrite *trishna*, palie *tanha*) al aferoj kiuj apartenas al la stato de la persona esto en la materia mondo. Tiu neestingita soifo al korpa esto (*bhava*) estas forto, kaj enhavas kreantan

forton tiel grandan ke ĝi retiras la estaĵon al la monda vivo.

*134. Demando: Ĉu la naturo de la nekontentigitaj deziroj iel influas niajn renaskiĝojn?*

Respondo: Jes, kaj same faras niaj individuaj meritoj kaj mankoj.

*135. Demando: Ĉu nia merito aŭ manko decidas la staton aŭ formon kie ni renaskiĝas?*

Respondo: Jes. La ĝenerala regulo diras ke se ni havas multe da merito, tiam ni venontfoje havos bonan kaj feliĉan naskiĝon, sed se ni havas multe da manko, tiam nia venonta naskiĝo estos malfeliĉa kaj plena de suferado.

*136. Demando: Unu el la plej gravaj kolonoj de la budhismo do estas ke ĉiu efiko estas la rezulto de certa kaŭzo, ĉu ne?*

Respondo: Ĝuste, de kaŭzo aŭ senpera aŭ malproksima.

*137. Demando: Kiel ni nomas tiun kaŭzan interrilationon?*

Respondo: Kiam temas pri individuoj estas karmo, tio estas agado. Tio signifas ke niaj propraj agoj donas al ni ĉiun ĝojon aŭ doloron, kiun ni spertas.

*138. Demando: Ĉu malbona homo povas eviti la sekvojn de sia karmo?*

Respondo: La Dharmopado diras:

”Nek en aero, nek en akvomezo,  
nek en montokavon enirinte  
trovas oni en la mondo lokon,  
kie loĝanto povas eviti malican agon.”

(Strofo 127)

*139. Demando: Ĉu bona homo povas eviti tion?*

Respondo: Kiel rezulto de aparte meritaj agoj, homo povas gajni certajn avantaĝojn pri loko, korpo, medio kaj instruado, kiam li atingas la venontan fazon en sia evoluo. Ili baras la efikojn de malbona karmo kaj faciligas lian progresantan evoluon.

*140. Demando: Kiel oni nomas ilin?*

Respondo: *Gati-sampatti, upadhi-sampatti, kala-sampatti kaj payoga-sampatti.*

*141. Demando: Ĉu tio estas konforma aŭ ne al komuna saĝo kaj la eltrovoj de moderna scienco?*

Respondo: Tute konforma. Pri tio ne estas dubo.

*142. Demando: Ĉu ĉiuj homoj povas iĝi budhoj?*

Respondo: Ne estas en la naturo de ĉiu homo iĝi budho, ĉar budhoj aperas nur maloftege, kaj ŝajne kiam la homaro nepre bezonas tian instruiston por montri la forgesitan vojon al nirvano. Sed ĉiu estaĵo havas la saman eblecon atingi nirvanon venkante ne-scion och gajnante saĝecon.

*143. Demando: Ĉu la budhismo diras ke homo renaskiĝas nur sur nia tero?*

Respondo: Ĝenerale estas tiel, ĝis li evoluis trans ĝia nivelo; sed la loĝataj mondoj estas sennombraj. La mondon en kiu oni naskiĝas venontfoje, same kiel la naturon de la renaskiĝo – tion decidas la fakto ĉu plej pezas onia merito

aŭ manko. Alivorte regas liaj altiroj, kiel dirus la scienco, aŭ lia karmo, kiel dirus ni budhanoj.

*144. Demando: Ĉu ekzistas mondoj pli perfektaj kaj evoluintaj ol nia tero, kaj aliaj malpli?*

Respondo: La budhismo diras ke ekzistas mondsistemoj diversspecaj, altaj kaj malaltaj, kaj ankaŭ ke la loĝantoj de ĉiu mondo korespondas al ĝia propra evoluo.

*145. Demando: Ĉu la Budho ne resumis sian tutan instruadon en unusolan strofon?*

Respondo: Jes.

*146. Demando: Ripetu ĝin!*

Respondo: ”Ĉiun malbonon ne fari,  
sanige ekagi,  
propran psikon purigi –  
jen de la Budhoj la mesaĝo.”

(La Dharmo-pado, strofo 183)

*147. Demando: Ĉu la tri unuaj linioj havas iujn klarajn karakterizaĵojn?*

Respondo: Jes. La unua linio esprimas la tutan spiriton de *Vinaya-pitaka*, la dua tiun de *Sutta-pitaka* kaj la tria tiun de *Abhidhamma-pitaka*. Ili enhavas tre malmultajn vortojn, sed kiel roso-guto ili spegulas la stelojn, ili brilas per la spirito de la tuta budho-dharmo.

*148. Demando: Ĉu tiuj reguloj montras la budhismon kiel aktivan aŭ pasivan religion?*

Respondo: "Ĉiun malbonon ne fari" eble oni povas nomi pasiva, sed "sanige ekagi" kaj "propran psikon purigi" estas ecoj tute aktivaj. La Budho diris ke ni ne nur ne estu malicaj, sed ke ni estu pozitive bonaj.

*149. Demando: Kio aŭ kiuj estas "la tri vojmontrantoj", kiujn budhano supozeble sekvu?*

[*Sarana*: Wijesinha Mudaliyar skribis al mi: "Ĉi tiu vorto ĝis nun tre maltaŭge kaj malĝuste estis tradukata per *rifuĝo* de eŭropaj pali-esploristoj, kaj tion senpripense akceptis niaj propraj pali-esploristoj. Nek la etimologio de la palia lingvo, nek la budhisma filozofio, pravigas tiun tradukon. *Rifuĝo*, signifante *fuĝon reen* aŭ protektita loko, estas tute fremda al la vera budhismo, kiu insistas ke ĉiu homo devas realigi sian propran liberiĝon. La sanskrita radiko *sr* (palie *sara*) signifas 'moviĝi', do *saranam* signifus 'movon', aŭ tiun kiu

moviĝas por aŭ kune kun iu alia – vojmontranton aŭ helpanton. Mi analizas la frazon tiel: *gacchami*, 'mi iras'; *Buddham*, 'al la Budho'; *saranam*, 'kiel vojmontranton'. La traduko de *tisarana* per 'la tri rifuĝoj' kaŭzis multe da miskompreno, kaj kontraŭbudhanoj uzis ĝin kiel bonan pretekston por inciti budhanojn pri la absurdeco rifuĝi al io kio ne ekzistas kaj kredi je io kio ne estas reala. La termino 'rifuĝo' pli bone aplikiĝas al nirvano, al kiu *saranam* estas sinonimo. La alta monaĥo Sumangala ankaŭ atentigas min ke la palia radiko *sara* havas alian signifon, 'mortigi' aŭ 'detruo'. *Buddham saranam gacchami* do tradukeblas per 'Mi iras al la vekiĝinto, al la vera instruo kaj al la komunumo kiel al la detruantoj de miaj timoj – la unua per sia instruado, la dua per sia aksioma vero, la tria per siaj pluraj ekzemploj kaj ekzercreguloj'."

Respondo: Ili estas menciataj en la formulo nomata *tisarana*: "La vekiĝinton mi sekvas kiel mian vojmontranton. La veran instruon mi sekvas kiel mian vojmontranton. La komunumon mi sekvas kiel mian vojmontranton." Tiuj tri fakte estas la budha dharmo.

*150. Demando: Kion li intencas kiam li ripetas tiun formulon?*

Respondo: li volas diri ke li rigardas la Budhon kiel sian tutsaĝan instruiston, amikon kaj



ekzemplon; la instruadon kiel enhavanta la esencajn kaj senŝanĝajn principojn de ĝusto kaj vero, kaj la vojon kiu gvidas al realigo de perfekta mensa paco surtere; kaj la komunumon, aŭ ordenon, kiel la instruistojn kaj ekzemplojn de la elstara doktrino de la Budho.

*151. Demando: Sed ĉu ne certaj membroj de tiu "ordeno" estas homoj intelekte kaj morale malsuperaj?*

Respondo: Jes, sed la Budho diras ke al lia "ordeno" apartenas nur tiuj, kiuj diligente sekvas la regulojn, bridas siajn mensojn kaj klopodoas atingi, aŭ jam atingis, unu el la ok stadiojn de sankteco kaj perfekteco. Estas eksplicite skribite, ke la komunumo celata en *tisarana* estas *attha-ariya-puggala* – la nobluloj, kiuj atingis unu el la ok stadioj de perfekteco. Nur porti flavan robon, aŭ eĉ esti ordinata, ne igas homon pura, saĝa aŭ respektinda.

*152. Demando: Do ne tiajn nedignajn bhikŝuojn vera budhano rigardas kiel siajn vojmontrantojn?*

Respondo: Certe ne.

*153. Demando: Kiuj estas la kvin observoj, aŭ ĝeneralaj moralreguloj, nomataj "pancha sila", kaj ĝenerale celataj al la laikoj?*

Respondo: Ili estas nomataj en ĉi tiu formulo, kiun budhanoj ripetas publike en la temploj:

La ekzercregulon ne lezi vivon mi akceptas.

La ekzercregulon ne preni nedonitaĵojn mi akceptas.

La ekzercregulon ne sensplezure misagadi mi akceptas.

[Tiu vortigo estas intencata por laikoj, kiuj akceptas nur kvin ekzercregulojn. Bhikŝuo devas vivi en strikta ĉasteco. Same tiu laiko kiu akceptas ok ekzercregulojn, aŭ ĉiujn dek, dum certaj periodoj, kaj kiu tiam devas vivi ĉaste. La kvin ekzercregulojn la Budho formulis por ĉiuj homoj. Ankaŭ se oni ne estas budhano, la kvin kaj ok ekzercreguloj povas esti avantaĝaj al ĉiuj. Budhano oni iĝas kiam oni akceptas "la tri rifuĝojn".]

La ekzercregulon ne paroli false mi akceptas.

La ekzercregulon ne uzi trinkaĵojn ebriigajn, trinkaĵojn fermentitajn, ebriigilojn apatiigajn, mi akceptas.

*154: Demando: Kio frapas inteligentan homon kiu legas tiujn regulojn?*

Respondo: Ke tiu, kiu sekvas ilin strikte, devas eviti ĉiun kaŭzon de homa sufero. Se ni studas la historion, ni trovas ke ĉiu sufero kreskis el unu aŭ alia de tiuj kaŭzoj.

*155. Demando: En kiuj el tiuj reguloj oni plej klare vidas la longe rigardantan saĝecon de la Budho?*

Respondo: En la unua, la tria kaj la kvina, ĉar mortigo, voluptemo kaj ebriigo kaŭzas almenaŭ 95 % de la homaj suferoj.

*156: Demando: Kion homo gajnas se li sekvas tiujn moralregulojn?*

Respondo: Laŭdire, li gajnas pli aŭ malpli da merito conforme al kiel kaj kiam li sekvas la regulojn, kaj kiom da ili li sekvas. Tio estas: se li sekvas nur unu el ili, kaj lezas la ceterajn kvar, tiam li gajnas nur la meriton pro sia sekvo de tiu, kaj ju pli longe li sekvas ĝin, des pli granda iĝas lia merito. Kiu sekvas ĉiujn regulojn, sen rompi

ilin, donos al si mem pli altan kaj feliĉan estontan vivon.

*157. Demando: Kiuj estas la ceteraj observoj, rigardataj kiel bonaj por laikoj akcepti libervole?*

Respondo: *Atthanga sila*, aŭ la ok reguloj, kiuj inkluzivas la kvin supere (kvankam la regulo ” ne sensplezure misagadi” estas pliseverigata kaj inkluzivas ĉiujn seksajn agojn), kaj tri pliajn, nome:

La ekzercregulon ne manĝi malĝustatempe mi akceptas.

La ekzercregulon rezigni dancadon, kantadon, muzikon kaj distraĵojn, florkronojn, parfumojn, ŝmiraĵojn kaj portadon de ornamaĵoj mi akceptas.

La ekzercregulon rezigni altajn kaj grandajn litojn mi akceptas.

La litoj ĉi tie menciataj estas tiuj uzataj de mondemuloj por ĝui. Kiu vivas ĉaste, tiu devas eviti ilin.

*158. Demando: Kiel budhano priskribus etan meriton?*

Respondo: Ne estas granda merito nur agi ekstere. Ĉio dependas de la interna intenco de la ago.

*159. Demando: Donu ekzemplon!*

Respondo: Riĉulo povas elspezi centmilojn da rupioj por konstrui stupaojn aŭ templojn, starigi statuojn de la Budho, organizi festenojn kaj procesiojn, doni manĝaĵojn al monaĥoj kaj malriĉuloj, planti arbojn, fosi akvujojn aŭ konstrui gastejojn laŭ la vojo por vojaĝantoj, kaj tamen ne havi tiom da merito pro tio se li faras tion por montri sin, aŭ por esti laŭdata de homoj, aŭ pro aliaj egoismaj kialoj. Sed kiu faras la plej etan el tiuj agoj kun bonkora intenco, pro amo al siaj proksimuloj, tiu havos grandan meriton. Bona ago farata pro malbona intenco estas utila por aliaj, sed ne por vi mem. Kiu aprobas bonan agon faritan de alia havos parton de la merito, se li faras tion sincere kaj ne nur ŝajnigas. Same pri malbonaj agoj.

*160. Demando: Sed kiu laŭdire estas la plej granda el ĉiuj merita agoj?*

Respondo: La Dharmo-pado diras ke pli granda ol ĉiuj aliaj bonaj agoj estas disvastigi la dharmon, la leĝon de justeco.

*161. Demando: Kiuj libroj enhavas ĉiun elstaran saĝecon en la doktrinoj de la Budho?*

Respondo: La tri tekstaroj nomitaj *Ti-pitaka*, aŭ "La tri korboj".

*162. Demando: Kiuj estas la nomoj de tiuj tri "pitaka", aŭ librogrupoj?*

Respondo: *Vinaya-pitaka*, *Sutta-pitaka* kaj *Abhidhamma-pitaka*.

*163. Demando: Kion enhavas ĉiu el ili?*

Respondo: La unua enhavas ĉion pri la moralo kaj disciplinreguloj, de la sangho aŭ ordeno; la dua enhavas instruojn pri etiko, aplikeblaj por ĉiuj; la tria klarigas la psikologiajn instruojn de la Budho, inkluzive la dudek kvar transcendajn leĝojn kiuj klarigas kiel la naturo funkcias..

*164. Demando: Ĉu budhanoj kredas ke tiuj libroj estas inspiritaj aŭ rivelitaj de iu dia estaĵo?*

Respondo: Ne, sed ili respektas ilin, ĉar ili enhavas ĉiujn partojn de lia elstara instruo, kiu povas helpi tiun, kiu konas ilin, rompi ĉiujn katenojn de sansaro.

*165. Demando: Kiom da vortoj enhavas la tuta teksto de la Ti-pitako?*

Respondo: Doktoro Rhys-Davids kalkulas ke ili estas 1 752 800.

*166. Demando: Kiam la Ti-pitako unuafoje estis skribe fiksita?*

Respondo: Dum la jaroj 88-76 a. Kr., dum la regtempo de la sinhala reĝo Vattagamini, aŭ 330 jarojn post la parinirvano de la Budho.

*167. Demando: Ĉu ni havas kialon kredi ke ni konas ĉiujn parolojn de la Budho?*

Respondo: Verŝajne ne, kaj se jes, tio estus tre mirige. Dum la 45 jaroj, kiam li estis publike aktiva, li certe faris multajn centojn da paroloj. El tiuj, certe multaj estis perdataj en tempoj de milito kaj persekutado, multaj dissemataj al fremdaj landoj, kaj multaj deformataj. La historio diras ke malamikoj de la budho-dharmo

bruligis stakojn da niaj libroj, altajn kiel kokospalmoj.

*168. Demando: Ĉu budhanoj rigardas ka Budhon kiel iu, kiu per sia propra virto povas savi nin de la sekvoj de niaj individuaj pekoj?*

Respondo: Tute ne. La homo devas liberigi sin mem. Antaŭ tio, li daŭre renaskiĝas fojon post fojo – viktimo de ne-scio, sklavo de senbridaj pasioj.

*169. Demando: Kio do la Budho estis por ni, kaj por ĉiuj aliaj estaĵoj?*

Respondo: Tutvidanta kaj tutsaĝa konsilanto, iu kiu trovis la sekuran vojon kaj montris ĝin, kiu montris la kaŭzon kaj la solan rimedon kontraŭ la homa suferado. Montrante al ni la vojon, instruante nin kiel ni povas eviti la danĝerojn, li iĝis nia vojmontranto. Li estas por ni kvazaŭ homo, kiu kondukas blindulon trans mallarĝa ponto super rapida kaj profunda rivero, kaj kiu tiel savas lian vivon.

*170: Demando: Se ni provus esprimi la tutan esencon de la Budha instruo per unusola vorto, kiun vorton ni do elektu?*



Respondo: Ĝusteco.

*171. Demando: Kial?*

Respondo: Ĉar ĝi diras ke ĉiu homo ricevas, laŭ la senerara karmo-leĝo, ekzakte la rekompencon aŭ punon kiun li meritas, nek pli nek malpli. Neniu bona aŭ malbona ago, kiel ajn sensignifa, kaj kiel ajn sekrete farita, evitas esti karme pezata..

*172. Demando: Kio estas karmo?*

[Karmo estas difinita kiel la tuta sumo de la agoj de iu homo. La 'leĝo pri kaŭzo kaj efiko estas nomata *paticca-samuppada-dhamma*. En *Anguttara-nikaya*, la Budho diras ke "mia ago estas mia posedaĵo, mia ago estas mia heredaĵo, mia ago estas la utero kiu portas min, mia ago estas mia parenco, mia ago estas mia rifuĝo".]

Respondo: Kaŭzoleĝo kiu efikas kaj sur la morala nivelo, sur la fizika kaj sur aliaj niveloj. La budhanoj diras ke ne ekzistas mirakloj, sed kion homo semas, tion li nepre rikoltos.

*173. Demando: Kiu ajn aliaj bonaj vortoj estis uzataj por esprimi la esencon de la budhismo?*

Respondo: Memkulturo kaj universala amo.

*174. Demando: Kiu doktrino nobligas la budhismon kaj donas al ĝi ĝian altan pozicion inter la religioj de la mondo?*

Respondo: *Metta* aŭ *maitri* – kompatema ĝentileco. La gravecon de tiu doktrino substrekas ankaŭ la fakto ke oni donis al la venonta Budho la nomon *Metteyya* aŭ *Maitreya*.

*175. Demando: Ĉu la Budho meditadis proksime al la Bo-arbo pri ĉiuj tiuj doktrinoj, kiujn vi klarigis?*

Respondo: Jes, kaj pri multaj pliaj, pri kiuj oni povas legi en la budhismaj libroj. Dum la granda iluminiĝo, li ekvidis la tutan sistemon de la budhismo.

*176. Demando: Kiom longtempe, la Budho restis proksime al la Bo-arbo?*

Respondo: 49 tagojn.

*177. Demando: Kiel ni nomas la unuan parolon, kiun la Budho faris al siaj kvin ekskunuloj?*

Respondo: *Dhamma-cakka-ppavattana-sutta* – la sutro pri la ekmovigo de la rado de la instruado.

[Post la unua eldono mi ricevis de unu el la plej kleraj pali-esplorantoj de Cejlono, la forpasinta L. Corneille Wijesinha, Esq., *mudaliar* de Matale, ion kio povas esti pli bona traduko de *Dhamma-cakka-ppavattana* ol la antaŭe proponita; li interpretas la vorton kiel "la establighon de la superregado de la leĝo". Profesoro Rhys-Davids preferas "la establighon de la regno de justeco". Sinjoro Wijesinha skribas al mi: "Vi povas uzi ankaŭ "regno de justeco", sed tio sonas pli kiel dogma teologio ol filozofia etiko. *Dhamma-cakka-ppavattana-sutta* estas 'la parolo titolita 'la establigho de la superregado de la leĝo'." Montrinte tion al la alta monaĥo, mi ĝojas ke mi povas diri ke li akceptas la interpreton de sinjoro Wijesinha.]

*178. Demando: Kiujn temon li pritraktis en tiu parolo?*

Respondo: La kvar noblajn verojn kaj la noblan okeran vojon. Li kondamnis unuflanke la ekstreman memturmentadon de la asketoj, kaj aliflanke senbridajn sensĝuojn, kaj li indikis kaj rekomendis la noblan okeran vojon kiel la mezan vojon.

*179. Demando: Ĉu la Budho akceptis bild-adoradon?*

Respondo: Ne, li estis kontraŭ tio kaj kondamnis adoradon al dioj, demonoj, arboj ktp. Ekstera adorado estas kateno, kiun oni devas rompi por povi atingi ion pli altan.

*180. Demando: Sed ĉu budhanoj ne kutimas respekti la statuojn kaj relikvojn de la Budho, kaj la monumentojn kiuj enhavas ilin?*

Respondo: Jes, sed ne kun la sentoj de idol-adoranto.

*181. Demando: Kio estas la diferenco?*

Respondo: Nia pagana frato ne nur rigardas siajn statuojn kiel videblajn bildojn de siaj nevidataj dioj, sed kiam la kulturita idol-adoranto preĝas, li kredas ke la bildo en sia materio enhavas parton de la dio, kiu penetras ĉion.

*182. Demando: Kion opinias la budhano?*

Respondo: La budhano respektas la statuon de la Budho, kaj la aliajn aferojn kiujn vi menciis, nur

por memori la plej saĝan, plej bonvolan kaj plej kompateman homon en ĉi tiu erao (*kalpo*). Ĉiuj gentoj kaj popoloj protektas kaj estimas la relikvojn kaj memorojn de la homoj kiuj iel estis rigardataj kiel grandaj. Ni opinias ke la Budho pli ol iu alia meritas esti respektata kaj amata de ĉiu homo, kiu suferas.

*183. Demando: Ĉu la Budho mem diris al ni ion klaran pri tiu demando?*

Respondo: Certe. En *Maha-parinibbana-sutta*, li diras ke oni povas liberiĝi nur se oni vivas la sanktan vivon, laŭ la nobla okera vojo, ne per ekstera adorado (*amisa-puja*), ne adorante sin mem, aŭ iun alian, aŭ iun bildon.

*184. Demando: Kion la Budho opiniis pri ceremoniismo?*

Respondo: Jam dekomence, li kondamnis la plenumon de ceremonioj kaj aliaj eksteraj kutimoj, kio nur kreskigas nian spiritan blindecon kaj nian kroĉadon al nur senvivaj formoj.

*185. Demando: Kaj pri disputoj?*

Respondo: En multaj paroloj, li kondamnis tiun kutimon kiel tre malutila. Li preskribis punojn por bhikŝuoj kiuj malŝparas sian tempon kaj malfortigas siajn altajn intuiciojn kverelante pri teorioj kaj metafizikaj subtilaĵoj.

*186. Demando: Ĉu amuletoj, sorĉ-admonoj, observado de bon-aŭguraj horoj kaj diablo-dancoj estas parto de la budhismo?*

Respondo: Ili estas klare kontraŭ ĝiaj bazaj principoj. Ili estas postvivantaj restoj de fetiĉismo, panteismo kaj aliaj fremdaj religioj. En *Brahma-jala-sutta*, la Budho kategorie priskribis tiujn kaj aliajn superstiĉojn kiel paganaj, malaltaj kaj malveraj.

[Ke tiaj kutimoj estas miksataj kun la budhismo estas signo de dekadenco. Iliaj faktoj kaj fenomenoj estas realaj kaj povas esti klarigataj science. Ili estas inkluzivitaj en la termino "magio", sed kiam ili estas praktikataj pro egoismaj celoj, ili altiras malbonajn influojn kaj malhelpas spiritan progreson. Kiam praktikataj pro celoj neofendaj kaj bonefikaj, ekzemple por sanigi malsanulojn, savi vivojn ktp, la Budho permesis ilin.]

*187. Demando: Kiuj klaraj kontrastoj ekzistas inter la budhismo kaj tio, kion oni povas vere nomi "religioj"?*

Respondo: Interalie ĉi tiuj: La budhismo parolas pri la plej alta bono sen kreanta dio; pri vivkontinuo sen akcepti la superstiĉan kaj egoisman doktrinon pri eterna, metafizika animo kiu forlasas la korpon; pri feliĉo sen objektiva ĉielo; pri savmetodo sen peranta savanto; pri repacigo kun oni mem kiel paciganto; kaj sen ritoj, preĝoj, pentofarado, pastroj aŭ perantaj sanktuloj; kaj pri plej alta bono, tio estas nirvano, atingebla dum ĉi tiu vivo kaj en ĉi tiu mondo per pura, neegoisma vivo de saĝo kaj kompatato al ĉiuj estaĵoj.

*188. Demando: Klarigu pli klare la du specojn de meditado, tio estas la proceso per kiu oni estingas pasion kaj gajnas konon!*

Respondo: *Samatha* kaj *vipassana*: 1. por malfortigi la pasion per vivado de la sankta vivo kaj ĉiama strebado bridi la sensojn, 2. por gajni supernormalan saĝecon per pripensado. Ĉiu el ili enhavas dudek aspektojn, sed ĉi tie mi ne bezonas specifi ilin.

*189. Demando: Kiuj estas la kvar vojoj aŭ stadioj, kiujn oni povas atingi?*

Respondo: 1. *Sotapatti*, kiun oni atingas kiam oni klare komprenis la kvar noblajn verojn, 2. *sakadagamita*, kiam oni venkis sian avidon, sian malamon kaj sian memtrompon tiom ke oni devas reveni al ĉi tiu mondo nur unu fojon, 3. *anagamita*, kiam oni venkis sian egoon tiom ke oni ne devas reveni al ĉi tiu mondo, 4. *arahatta* – la vojo de la sankta kaj digna arahanto, kiam oni ne nur estas libera de la bezono renaskiĝi, sed ankaŭ ebligis al si mem ĝui perfektan saĝecon, senliman kompaton al la nesciantoj kaj suferantoj, kaj nemezureblan amon al ĉiuj estaĵoj.

*190. Demando: Ĉu la popola budhismo ne enhavas aliajn aferojn ol verajn kaj konformajn al scienco?*

Respondo: Kiel ĉiu alia religio, kiu ekzistis dum multaj jarcentoj, ĝi certe nun enhavas malveron miksitian kun vero. Oro estas ĉiam miksitaj kun skorio. Je malsamaj tempoj kaj landoj, la poezia fantazio, fervoro aŭ restanta superstiĉo de la budhanoj pli-malpli ligis la noblajn principojn



de la moralaj instruoj de la Budho al aferoj preferinde lasindaj.

*191. Demando: Kiam tiaj misprezentoj estas trovataj, kion volu la vera budhano?*

Respondo: La vera budhano ĉiam pretu kaj volu vidi la veran esti purigata el la falsa, kaj helpi ke tio okazu, se li povas. La sangho faris tri grandajn konciliojn eksplicite por purigi la doktrinaron el ĉiuj falsaj aldonoj.

*192. Demando: Kiam?*

Respondo: La unua en la Sattapanni-kaverno, tuj post la morto de la Budho; la dua en Valukarama, en Vesali; la tria en Asokarama Vihara, en Pataliputra, 235 jarojn post la morto de la Budho.

*193. Demando: En kiu parolo la Budho mem avertas nin ke ni povas atendi ke la vera instruo estos tordata?*

Respondo: En *Samyutta-nikaya*.

*194. Demando: Ĉu estas en la budhismo iuj dogmoj kredendaj?*

Respondo: Ne. Ni estas sincere admonataj ne akcepti ion nur pro kredo, senkonsidere ĉu estas skribita en libroj, transdonata el niaj prapatroj aŭ instruata de saĝuloj.

*195. Demando: Ĉu li vere mem diris tion?*

Respondo: Jes. La Budho diris ke ni ne kedu je io dirata nur ĉar dirata; ne je tradicioj, ĉar transdonitaj el praaj tempoj; ne je onidiroj, kiel tiaj; ne je io skribita de saĝuloj, nur ĉar saĝuloj skribis tion; ne je fantazioj, kiujn ni povas kredi esti inspiritaj al ni de iu devao (tio estas supozata spirita inspiro); ne je konkludoj el iuj kapricaj supozoj; ne je io kiu ŝajnas esti necesa analogio; ne je la nura aŭtoritato de niaj instruistoj aŭ majstroj.

*196. Demando: Je kio ni do devas kredi?*

Respondo: Ni kedu kiam la skribaĵon, instruiston aŭ diraĵon konfirmas niaj propraj racio kaj konscio. ”Tial,” li finas, ”mi instruis al vi ne kredi nur ĉar vi aŭdis, sed kiam vi kredis pro propra konvinko, tiam agu laŭe kaj abunde. (Vidu *Kalama-sutta* en *Anguttara-nikaya*, och *Maha-parinibbana-sutta*.)

*197. Demando: Kiel la Budho nomas sin mem?*

Respondo: Li diras ke li kaj la aliaj budhoj nur estas "proklamantoj" de vero kaj montras la vojon. Ni devas mem strebadi..

*198. Demando: Kie tio estas dirita?*

Respondo: En ĉapitro 20 de la Dharmo-pado.

*199. Demando: Ĉu la budhismo instigas al hipokriteco?*

Respondo: La Dharmo-pado diras:

"Kiel bela floro  
kunkolora, senodora,  
estas bone parolita vorto  
senfrukta se senaga."

(Strofo 51)

*200. Demando: Ĉu la budhismo diras ke ni pagu malbonon por malbono?*

Respondo: En la Dharmo-pado, la Budho diris:

”Per afableco venku koleron.  
Malbonon per bono venku.  
Venku avarulon per donemo  
kaj per vero mensogulon.”

(Strofo 223)

Tio estas la vojo sekvata de arahanto. Pagi malbonon por malbono estas eksplicite malpermesite en la budhismo.

[Budhisma asketo kiu, per preskribita praktikado, atingis pli altan nivelon de spirita kaj intelekta evoluo. Arahantoj ekzistas de du ĝeneralaj specoj: *samathayanika* kaj *sukkha-vipassaka*. La unua grupo neniigis siajn pasiojn kaj plene evoluigis sian intelektan kapablon aŭ mistikan komprenon. Ankaŭ la dua grupo venkis la pasion, sed ne gajnis la altajn psikajn fortojn. La unua grupo povas evoluigi fenomenojn, la dua ne povas. Kiam arahanto estas tute evoluinta, li ne plu estas viktimo de la trompoj de la sensoj, ne sklavo sub la pasioj aŭ mortiga malfortiko. Li penetras ĝisradike kion ajn li entreprenas, sen sekvi la malrapidan vojon de rezonado. Lia venko super si mem estas kompleta, kaj anstataŭ la sentoj kaj deziroj, kiuj tormentas kaj sklavigas la ordinaran homon, li estas levata al stato plej bone nomata ”nirvana”. En Cejlono ekzistas popola miskompreno ke en nia tempo ne eblas arahantiĝi, ke la Budho mem antaŭdiris ke tiu kapablo formortos mil jarojn post lia morto. Tiun onidiron – same kiel alian, kiun mi aŭdis ĉie en Hindio, nome ke, ĉar ĉi tio estas la

malhela erao *kali-yuga*, nun ne eblas praktiki *yoga-vidya*, aŭ la subliman spiritan sciencon – mi atribuas al la eltrovemo de tiuj kiuj devus esti same puraj kaj (por uzi terminon ne budhisman sed tre taŭgan) psike saĝaj kiel siaj antaŭantoj, sed ne estas tio, kaj kiuj tial serĉas senkulpigon! Sed la Budho diris la rektan malon. En *Digha-nikaya*, li diris: ” Se la bhikŝuoj, ho Subhadda, vivas ĝuste, tiam en la mondo ne mankos arahantoj.”]

*201. Demando: Ĉu la budhismo instigas al krueleco?*

Respondo: Certe ne. En la kvin ekzercreguloj, kaj en multaj el siaj paroloj, la Budho instruas al ni esti kompatemaj al ĉiuj estaĵoj, provi feliĉigi ilin, ami ilin ĉiujn, deteni nin de mortigo aŭ akcepto aŭ instigo al tio.

*202. Demando: En kiu parolo tio estas dirita?*

Respondo: *Dhammika-sutta* diras: ”Ne lasu lin” (la dompatron) ”detruu iun ajn vivon, aŭ kaŭzi ke iu vivo estas detruata, aŭ konsenti ke tio estas farata.

Ne lasu lin iam ajn lezi iun estaĵon” ktp.

[Kolb diras, en sia *History of Culture*: ”La budhismon ni povas danki ke militkaptitojn oni lasas vivi, anstataŭ kiel

antaŭe mortigi ilin, kaj ke oni ne plu forigas la loĝantojn de konkeritaj landoj en malliberecon.”]

*203. Demando: Ĉu la budhismo sankcias ebriigon?*

Respondo: En *Dhammika-sutta*, ni estas avertitaj ne drinki ion ebriigan, ne instigi aliajn drinki kaj ne aprobi ke iuj faras tion.

[La kvina ekzercregulo temas nur pri konsumo de ebriigiloj kaj stultigaj drogoj, kiuj fine kondukas al ebrieco.]

*204. Demando: Kien oni diras ke ebrieco kondukas?*

Respondo: Al malkreskanta merito, psika malsano kaj nescio – kiu estas la ĉefa kaŭzo de renaskiĝo.

*205. Demando: Kion la budhismo diras pri la geedzeco?*

Respondo: Ĉar absoluta ĉasteco estas antaŭkondiĉo por plena spirita evoluo, tio estas rekomendata unuavice, sed edzeco al nur unu edzino, kaj fideleco al tiu, estas akceptata kiel

iaspeca ĉasteco. Poligamion la Budho mallaŭdas, ĉar ĝi entenas nescion kaj favoras deziron.

*206. Demando: En kiu parolo?*

Respondo: En *Anguttara-nikaya*, ĉap. IV:55.

*207. Demando: Kion la budhismo diras pri la devoj de gepatroj al iliaj infanoj?*

Respondo: Ili detenu ilin de malbono, instigu ilin al bono, instruu al ili tion kion ili scias, kunigu ilin kun taŭgaj edzinoj kaj edzoj kaj donu al ili ilian heredaĵon.

*208. Demando: Kiuj estas la devoj de la infanoj?*

Respondo: Prizorgi siajn gepatrojn kiam ili estas maljunaj kaj bezonas tion, fari kion indas fari por ili, gardi iliajn posedaĵojn, ekmeriti esti iliaj heredantoj kaj, kiam ili forpasis, honorigi ilian memoron.

*209. Demando: Kiujn devojn lernanto havas al sia instruisto?*

Respondo: Montri respekton, servi, obei, plenigi liajn bezonojn, atenti lian instruadon.

*210. Demando: Kaj la edzo al sia edzino?*

Respondo: Prizorgo, respekto kaj ĝentileco, fideleco, akcepti sian respondecon, doni al ŝi ornamaĵojn.

*211. Demando: Kaj la edzino al sia edzo?*

Respondo: Fari siajn taskojn bone, esti tre afabla al la amikoj ĉirkaŭ ili, esti fidela, protekti la kolektitan, sperte kaj energie fari ĉion farendan.

*212. Demando: Kie tio estas instruata?*

Respondo: En *Sigalovada-sutta*.

*213. Demando: Ĉu riĉaĵoj helpas homon al estonta feliĉo?*

Respondo: La Dharmo-pado diras:

”Alia estas ilo de profito,  
alia estas vojo al nirvano.”

(Strofo 75)



*214. Demando: Ĉu tio signifas ke neniu riĉulo povas atingi nirvanon?*

Respono: Tio dependas de kion li plej amas. Se li uzas siajn riĉaĵojn por la bono de la homaro – por la suferantoj, la subprematoj, la nesciantoj – tiam liaj riĉaĵoj helpas lin gajni meriton.

*215. Demando: Kaj se ne?*

Respondo: Sed se li amas monon kaj avare kolektas ĝin nur por posedi ĝin, tiam tio malfortigas lian moralsenton, instigas lin al krimoj, igas homojn malbeni lin kaj havos sekvojn en la venonta naskiĝo

*216. Demando: Kion la Dharmo-pado diras pri ne-scio?*

Respono: Ke ĝi estas pli malbela makulo ol iu alia, kiun homo povas ekhavi.

*217. Demando: Kion la Dharmo-pado diras pri senkompato al aliaj?*

Respondo:

”Facile videblas alies mankoj,

la propraj pene.  
Vere alies difektojn  
oni kribras kiel grajnŝelojn.  
Proprajn oni kaŝas  
kiel trompludanto ĵetkubon malbone ĵetitan.”

(Strofo 252)

*218. Demando: Kiujn konsilojn la Budho donas pri la devoj de homo al malriĉuloj?*

Respondo: Li diras ke oni dividu sian netan enspezon en kvar partojn, kaj ke unu parto estu uzata por bonfarado.

*219. Demando: Kiuj kvin profesioj estas nomataj malnoblaj kaj fiaj?*

Respondo: Vendi ebriigilojn, vendi bestojn por buĉado, vendi venenojn, vendi armilojn kaj komerci per sklavo.

*220. Demando: Pri kiuj estas dirite ke ili estas nekapablaj al spirita progreso?*

Respondo: Tiuj kiuj mortigas sian patron, sian patrinon aŭ sanktan arahanton, bhikŝuoj kiuj semas malkonkordon en la sangho, tiuj kiuj

provas lezi la personon de budho, tiuj kiuj havas ekstreme nihilismajn opiniojn pri estonta vivo, kaj tiuj kiuj estas ekstreme voluptamaj.

*221. Demando: Ĉu la budhismo specifas la turmentejojn, al kiuj la karmo de malica homo kondukas lin post ĉi tiu vivo?*

Respondo: Jes. Ili estas *Kalāsutra, Sanghata, Raŭrava, Maha-Raŭrava, Tapa, Pratapa, Aviĉi.*

*222. Demando: Ĉu la turmentoj estas eternaj?*

Respondo: Certe ne. Kiom longe ili daŭras, tio dependas de onia karmo.

*223. Demando: Ĉu la budhismo diras ke tiuj, kiuj ne kredas je la Budho, nepre estos damnataj pro sia malkredo?*

Respondo: Ne. Pro bonaj agoj ili povas ĝui limigitan feliĉon, antaŭ esti tirataj en la renaskiĝon per sia neestingita soifo. Por eviti renaskiĝon, oni devas iri la noblan okeran vojon.

*224. Demando: Kiun spiritan pozicion virinoj havas inter budhanoj?*

Respondo: Laŭ nia religio, ili estas je ekzakte la sama nivelo kiel viroj. ”Virino,” la Budho diras en *Chullavedalla-sutta*, ”povas atingi la plej supran vojon de sankteco” – la arahanteco – kiu estas atingebla al viroj.

*225. Demando: Kion diras moderna kritikisto pri la efiko de la budhismo al virinoj?*

Respondo: Ke ”ĝi faris pli por la feliĉo kaj liberiĝo de la virino ol iu alia kredo” (sir Lepel Griffin).

*226. Demando: Kion la Budho diris pri kasto?*

Respondo: Ke oni ne apartenas al iu kasto, ĉu *paria*, la plej malalta, ĉu *brahmana*, den plej alta, pro sia naskiĝo, sed pro siaj agoj. ”Pro agoj oni estas senkastuo,” li diris, ”pro agoj oni estas brahmano.” (Vidu *Vasala-sutta*!)

*227. Demando: Rakontu ion, kio ilustras tion!*

Respondo: Kiam Ananda pasis puton, li soifis, kaj li petis Prakriti, knabino el la matanga aŭ *paria* kasto, doni al li akvon. Ŝi diris ke ŝi estas el tiel malalta kasto ke li malpuriĝus, se li ricevus akvon el ŝia mano. Sed Ananda

respondis: ”Mi ne demandis pri via kasto, mi petis pri akvo.” La matanga knabino ekĝojis kaj donis al li trinkakvon. La Budho benis ŝin pro tio.

*228. Demando: Kion la Budho diris en Vasalasutta pri viro el la pariasopaka-kasto?*

Respondo: Ke li per siaj meritoj atingis la plej altan famon, ke multaj kŝatrioj kaj brahmanoj servis lin, kaj ke li postmorte renaskiĝis en la Brahmo-mondo, dum multaj brahmanoj pro siaj malbonaj agoj naskiĝas en infero.

*229. Demando: Ĉu la budhismo diras ke la animo estas senmorta?*

Respondo: Ĝi opinias ke ”animo” estas vorto uzata de ne-sciantoj por esprimi falsan ideon. Se ĉio ŝanĝiĝas, tiam ankaŭ la homo faras tion, kaj ĉiuj liaj materiaj eroj devas ŝanĝiĝi. Kio devas ŝanĝiĝi, tio ne estas eterna, do kio devas ŝanĝiĝi, tio ne povas esti senmorta.

[La animo ĉi tie kritikata estas analoga al la greka *psyche*. La vorto ”materia” inkluzivas aliajn materiajn statojn ol tiuj de la fizika korpo.]

*230. Demando: Kio estas tiel maltaŭga pri la vorto "animo"?*

Respondo: Ĝia ligiteco al la ideo ke la homo povas esti unuo aparta de ĉiuj aliaj unuoj, kaj de la ekzisto de la tuta universo. La ideo pri tia aparteco estas nedefendebila, ne povas esti logike pruvata kaj ne estas subtenata de la scienco.

*231. Demando: Do ne ekzistas iu aparta "mi", kaj ni ne povas diri ke tio aŭ ĉi tio estas "mia"?*

Respondo: Ĝuste.

*232. Demando: Se la penso pri aparta animo estu rifuzata, kio en la homo do donas al li la impreson de permanenta personeco?*

Respondo: *Tanha*, aŭ la nekontentigita deziro ekzisti. Kiam iu estaĵo faris tion, pro kio li devas esti premiata aŭ punata estontece, kaj se li havas *tanha*, tiam li renaskiĝos sub la influo de karmo.

*233. Demando: Kio naskiĝas?*

Respondo: Nova kolekto de "skandhoj", aŭ personeco kaŭzita de la lasta kreanta penso de mortanto.

[Pli bone pensante, mi anstataŭis "individuecon", kiel estis skribite en la unua eldono, per "personeco". La sinsekvaj aperoj sur unu aŭ multaj teroj, aŭ la "subeniroj en la estigon" en la partoj de certa estaĵo ligitaj al *tanha* (skandhoj), estas vico de personecoj. En ĉiu naskiĝo, la personeco malsamas al la antaŭa aŭ tuj venonta. Karmo, *deus ex machina*, maskas (aŭ ĉu ni diru spegulas?) sin, ĉu en la personeco de saĝulo, ĉu en tiu de metiisto, kaj tiel plu en la tuta vico de naskiĝoj. Sed ankaŭ se la personecoj ĉiam varias, ili sekvas unu la alian kiel globoj sur unusoa fadeno; estas ĉiam ĝuste ĉi tiu fadeno, ne alia. Ĝi tial estas individuo – individua viv-ondo – kiu fluas tra la natura flanko de la naturo, sub la impulso de karmo kaj la krea celdirekto de *tanha*, kaj kiu pludaŭras tra multaj ciklaj ŝanĝoj. Profesoro Rhys-Davids nomas tion, kiu transiras de unu personeco al alia laŭ la individua ĉeno, "karaktero" aŭ "ago". Ĉar "karaktero" estas ne nur metafizika abstraktaĵo, se la sumo de oniaj psikaj ecoj kaj moralaj tendencoj, ĉu ne faciligus dispeli kion profesoro Rhys-Davids nomas "la senespera solvo de mistero" (*Buddhism*, p. 101) se ni rigardus la ondo-movadon de la naskomanifestoj kiel apartan personecon? Ni bezonas du vortojn por distingi la konceptojn, kaj mi ne trovas iujn same klarajn kaj esprim-kapablajn kiel tiuj kiujn mi elektis. La perfektigita individuo, budhisme dirite, estas budho, mi dirus, ĉar budho nur estas la rara floro de la homaro, ne miksitaj de io ajn supernatura. Kaj ĉar sennombraj

generacioj – ”kvar *asankheyya* kaj centmil kalpoj (Fausbøll kaj Rhys-Davids: *Buddhist Birth Stories*) – estas necesaj por evoluigi homon al budho, kaj la fera volo iĝi tia daŭras tra ĉiuj sinsekvaj naskiĝoj, kiel ni nomu tion kiu tiel volas kaj insistas? Karaktero aŭ individueco? Individueco nur parte manifestita en unuopa naskiĝo, sed kunmetita el fragmentoj el ĉiuj naskiĝoj.

Kiam la Budho neis iun ”animon”, tio indikas la kutiman eraran kredon je sendependa personeso; iu unuo, kiu post unusola naskiĝo irus al fiksa loko aŭ stato, kie ĝi poste, kiel perfekta unuo, ĝuos aŭ suferos eterne. Kaj kion li montras estas ke la ”mi estas mi”-konscio pri daŭreco estas logike nebla, ĉar ĝiaj lastvicaj eroj ĉiam ŝanĝiĝas, kaj ”mi” en unu naskiĝo malsamas al ”mi” en ĉiu alia naskiĝo. Sed ĉio, kion mi trovis en la budhismo, konformas al la teorio pri grada evoluo de la perfektigita homo – tio estas budho – tra sennombraj naskiĝospertoj. Kaj en la konscio de tiu individuo, kiu ĉe la fino de certa naskiĝoĉeno atingas budhecon, kaj kiu sukcesis atingi la kvaran *dhyana*, aŭ mistikan memevoluo, en iu el siaj naskiĝoj antaŭ la lasta, aperas la scenoj de tiu tuta vico de naskiĝoj. En *Jatakathavannana* – tiel bone tradukita de profesoro Rhys-Davids – ĉiam revenadas esprimo kiun mi opinias sufiĉe bone apogas tian interpreton, nome: ”Tiam la sublimulo malkaŝis okazintaĵon kaŝitan de nova naskiĝo,” aŭ ”tion kio estis kaŝita de” ktp. La frua budhismo do evidente kalkulis je permanenta dokumentado en *akaŝo*, kaj je la eblo de homo vidi tion kiam li atingis la stadion de vera individua iluminiĝo. Ĉe la morto, kaj en konvulsioj kaj tanco, la *javana-citta* estas transigata al la objekto laste kreita de la deziroj. La volo vivi igas ĉiujn pensojn objektivaj.]



*234. Demando: Kiom estas la skandhoj?*

Respondo: Kvin.

*235. Demando: Nomu la kvin skandhojn!*

Respondo: En la palia lingvo, ili nomiĝas *rupa*, *vedana*, *sañña*, *sankhara* kaj *viññana*.

*236. Demando: Klarigu mallonge kio ili estas!*

Respondo: *Rupa*: materiaj kvalitoj; *vedana*: sentoj; *sañña*: abstraktaj ideoj; *sankhara*: psikaj tendencoj; *viññana*: psikaj fortoj, aŭ konscio. El tiuj ni estas formataj, per ili ni estas konsciaj pri la ekzisto, kaj per ili ni komunikiĝas kun la mondo ĉirkaŭ ni.

*237. Demando: Al kiu kialo ni devas atribui la malsamecojn en la kombinoj de la kvin skandhoj, kiuj faras ĉiun individuon malsama al ĉiu alia?*

Respondo: Al la maturiĝinta karmo de la individuo el liaj antaŭaj naskiĝoj.

238. *Demando: Kiu estas la forto aŭ energio kiu efikas, sub la kontrolo de karmo, por estigi la novan estaĵon?*

Respondo: *Tanha* – la volo vivi.

[La studanto povas kun avantaĝo konsulti Schopenhauer kiam temas pri ĉi tio. Arthur Schopenhauer, moderna germana filozofo plej elstara, diris ke "la principo, aŭ radikalo, de la naturo, kaj de ĉiuj ĝiaj objektoj, inkluzive la homan korpon, estas esence tio pri kio ni mem plej konscias en nia propra korpo, nome la volo. La intelekto estas duagrada povo de la unuagrada volo, funkcio de la cerbo kie tiu rebildigas sin mem kiel naturo, objekto kaj korpo, kiel en spegulo... La intelekto estas duagrada, sed ĝi povas, ĉe sanktuloj, instigi al tuttuta rezigno de la volo, ĉar ĝi pelas la 'vivon' kaj poste estingiĝas en nirvano". (L. A. Sanders en *The Theosophist* por majo 1882, p. 213.)]

239. *Demando: Sur kio baziĝas la doktrino pri renaskiĝoj?*

Respondo: Sur la percepto ke plena justeco, balanco kaj reguligo estas parto de la universala sistemo de la naturo. Budhanoj ne kredas ke unusola vivo – eĉ se oni longigas ĝin al cent aŭ kvincent jaroj – estas sufiĉe longa por premii aŭ puni la agojn de homo. La granda rondiro de renaskiĝoj okazas rapide aŭ malrapide, depende

de ĉu la pluraj vivoj de la individuo estis puraj aŭ malpuraj.

*240. Demando: Ĉu ĉi tiu nova kolekto de skandhoj – ĉi tiu nova personeco – estas la sama estaĵo kiel tiu en la antaŭa naskiĝo, pro kies tanha ĝi estiĝis?*

Respondo: Certamaniere estas nova estaĵo, certamaniere ne. En la palia lingvo, oni diras *na ca so, na ca año*, kio signifas "nek la sama, nek alia". Dum ĉi tiu vivo, la skandhoj ĉiam ŝanĝas, kaj dum la kvardekjarulo A. B. estas identa pri personeco kun la antaŭa dekokjarulo A. B, li tamen estas alia, ĉar la korpo dum la tuta tempo kadukiĝas kaj rekonstruiĝas, kaj ĉar la menso kaj karaktero ŝanĝiĝis. Tamen, la pli aĝa homo ĝuste rikoltas la rekompencan aŭ punon kiu estas la rezulto de liaj pensoj kaj agoj je ĉiu antaŭa parto de lia vivo. Same, la nova estaĵo kiu renaskiĝas estas la sama individuo kiel antaŭe, sed kun alia formo, aŭ nova kolekto de skandhoj, kaj ĝuste rikoltas la sekvojn de liaj pensoj kaj agoj en la antaŭa vivo.

[Fiziologie, la homa korpo tute ŝanĝiĝas ĉiun sepan jaron.]

*241. Demando: Sed la pli aĝa homo memoras kio okazis kiam li estis juna, kvankam li ŝanĝiĝis korpe kaj mense. Kial ni do ne kunportas la memorojn de antaŭaj vivoj el nia antaŭa naskiĝo al la nuna?*

Respondo: Ĉar la memoro estas parto de la skandhoj, kaj kiam la skandhoj ŝanĝiĝis dum ĉiu nova renaskiĝo, evoluas nova memoro, kiu dokumentas ĝuste tiun vivon. Tamen, la speguligoj de ĉiuj antaŭaj teraj vivoj devas postvivi, ĉar kiam la princo Siddhartha iĝis budho, li vidis la tutan sinsekvon de siaj antaŭaj naskiĝoj. Se ĉiuj tiuj okazoj ne postlasus spurojn, li ne povus fari tion, ĉar en tiu okazo ne ekzistus io kion li povus vidi. Ĉiu kiu atingis la kvaran *dhyana* (koncentronivelon) povas tiel postfakte spuri la vicon de siaj vivoj.

*242. Demando: Kiu estas la fina punkto de ĉiuj tiuj vicoj de ŝanĝoj?*

Respondo: Nirvano.

*243. Demando: Ĉu la budhismo diras ke ni agu bone por atingi nirvanon?*

Respondo: Ne. Tio estus tute egoisme, kvazaŭ la rekompenco pri kiu oni esperas estus mono, aŭ trono, aŭ iu alia sensĝuo. Nirvano ne estas tiel atingebla, kaj la malsaĝa spekulanto certe seniluziiĝos.

*244. Demando: Bonvolu klarigi tion pli detale!*

Respondo: Nirvano estas sinonimo de malegoismo, la tuta rezigno de la mio al la vero. La nescianta homo aspiras la feliĉon de nirvano sen havi la plej etan konon pri ĝia naturo. Foresto de egoismo estas nirvano. Fari bonon por atingi certan rezulton, aŭ vivi la sanktan vivon por gajni ĉielan feliĉon, ne estas la nobla vivo kiun la Budho preskribis. Sen espero pri rekompenco la nobla vivo estu vivata, kaj tio estas la plej alta vivo. La stato de nirvano estas atingebla dum oni vivas en ĉi tiu mondo.

*245. Demando: Diru la plej grandajn obstaklojn al progreso, nomitaj saŭĵojana aŭ katenoj!*

Respondo: La mi-iluzio (*sakkaya-ditthi*), dubo (*vicikicchī*), ritismo (*silabbata-paramasa*), voluptamo aŭ korpaj pasioj (*kama*), malamo aŭ antipatio (*patigha*), amo al la surtera vivo (*ruparaga*), amo al vivo en ĉielo (*aruparaga*),

fiero (*mana*), memkontento (*uddhacca*), ne-scio (*avijja*).

*246. Demando: Kiom el tiuj katenoj oni devas rompi por iĝi arahanto?*

Respondo: Ĉiujn.

*247. Demando: Kiu estas la kvin nivarana aŭ katenoj?*

Respondo: Avareco, malico, inerteco, fiero kaj dubo.

*248. Demando: Kial oni vidas tiun detalan disdividon de sentoj, impulsoj, psikaj meĥanismoj, obstakloj kaj progreshelpoj esti tiel multe uzata en la doktrinoj de la Budho? Estas tre konfuziga por komencanto.*

Respondo: Estas por helpi nin ekkoni nin mem, ekzercante niajn sensojn elpensi ĉiun temon detale. Sekvante tiun sistemon de memekzamenado, ni finfine ekhavas scion kaj vidas la veron tia kia ĝi estas. Tio estas la maniero, kiun ĉiu saĝa instruisto uzas por helpi sian lernanton evoluigi sian menson.

*249. Demando: Kiom el la disĉiploj de la Budho estas aparte konataj pro siaj superaj kvalitoj?*

Respondo: Okdek el ili estas tiel karakterizitaj. Oni nomas ilin *asiti maha-savaka*.

*250. Demando: Kion ampleksis la saĝeco de la Budho?*

Respondo: Li konis la naturon de la sciebla kaj de la nesciebla, de la ebla kaj de la malebla, la kaŭzon de merito kaj manko, li povis legi la pensojn de ĉiuj estaĵoj, li konis la leĝojn de la naturo, la iluziojn de la sensoj kaj la manierojn venki la dezirojn, li povis distingi la naskiĝojn kaj renaskiĝojn de la individuoj, kaj aliajn aferojn.

*251. Demando: Kiel ni nomas la fundamentan principon, kiu estas la bazo de la tuta instruado de la Budho?*

Respondo: Oni nomas ĝin *paticca-samuppada*.

[Tiun fundamentan principon oni povas nomi, en la palia lingvo, *nidana* – ”kaŭzo-ĉeno” aŭ, laŭlitere, ”la origino de la dependeco”. Dek du ĉeneroj estas specifitaj, nome *avijja*: nescio pri la vero de la natura religio; *sankhara*: kaŭzanta agado, karmo; *viññana*; konscio pri personeco,

87

”mi estas mi”]; *nama-rupa*: nomo kaj formo; *salayatana*: la ses sensoj; *phassa*: kontakto; *vedana*: sento; *tanha*: ĝu-deziro; *upadana*: sinkroĉado; *bhava*: individuiganta ekzisto; *jati*: naskiĝo; *jara, marana, soka, parideva, dukkha, domanassa, upayasa*: kadukiĝo, morto, ĉagreno, lamentado, senespero.]

*252. Demando: Ĉu estas facile kompreni ĝin?*

Respondo: Estas tre malfacile. Ĝian tutan signifon kaj amplekson povas kompreni nur la perfekte evoluintaj.

*253. Demando: Kion diris la granda komentariisto Buddhaghosa pri tio?*

Respondo: Ke eĉ li estis same senhelpa en tiu vasta pens-oceano kiel iu kiu flosas sur la akvo-oceano.

*254. Demando: Kial do la Budho diris en Mahapaninibbana-sutta ke li ne havas la fermitan manon de instruisto, kiu retenas certajn aferojn? Se lia tuta instruado estis malferma por ke ĉiuj komprenu, kial do tiel granda kaj klera homo kiel Buddhaghosa dirus ke ĝi estas tiel malfacile komprenebla?*



Respondo: La Budho evidente opiniis ke li instruis ĉion malkaŝe, sed same certa estas ke la veran bazon de la dharmo povas kompreni nur tiu, kiu perfektigis sian komprenkapablon. Tial, ĝi estas nekomprenebla al ordinaraj, neilumiĝintaj homoj.

*255. Demando: Kiel la instruo de la Budho subtenas tiun vidmanieron?*

Respondo: La Budho rigardis en la koron de ĉiu, kaj li instruis laŭ la individua temperamento kaj spirita evoluo.

### 3. La sangho

*256. Demando: Kiel budhismaj bhikŝuoj malsimilas al la pastroj de aliaj religioj?*

Respondo: En aliaj religioj, la pastroj pretendas esti perantoj inter la homoj kaj Dio, por helpi ilin ricevi pardonon pri siaj pekoj; budhismaj bhikŝuoj nek agnoskas nek atendas ion el iu dia potenco.

*257. Demando: Sed kial do valoris la penon krei tiun ordenon, aŭ frataron aŭ komunumon, aparta de ĉiuj aliaj homoj, se ili ne faru la samajn aferojn kiel aliaj religiaj ordenoj?*

Respondo: La intenco estis instigi la plej virtajn, inteligentajn, malegoismajn kaj spirite inklinajn homojn en iu lando retiri sin el la socia medio, kie iliaj sensamaj kaj aliaj egoismaj deziroj nature plifortiĝus, dediĉi siajn vivojn al strebado al la plej alta saĝeco kaj fari sin taŭgaj instrui aliajn kaj helpi ilin foriri el la agrabla vojo kiu kondukas al sufero, kaj eniri la pli malfacilan vojon kiu kondukas al vera feliĉo kaj finfina liberiĝo.

*258. Demando: Kiuj du reguloj, krom la ok, estas devigaj al bhikŝuoj?*

Respondo: La ekzercregulon rezigni dancadon, kantadon, muzikon kaj distraĵojn mi akceptas.

La ekzercregulon ne ricevi oron aŭ arĝenton mi akceptas.

La tuta *dasa-sila*, aŭ *bhikkhu-sila*, aŭ la dek ekzercreguloj, estas devigaj por ĉiuj bhikŝuoj kaj ŝramaneroj, aŭ noviceoj, sed libervolaj por laikoj.

*Atthanga-sila* estas por tiuj kiuj aspiras pli altajn statojn trans la ĉielaj regionoj, do nirvanon..

[Gelaikoj observas tiujn dum la budhismaj *uposatha*-tagoj (ripoztagoj), (sanskrite *upavasatha*). Ili estas la 8a kaj 14a aŭ 15a tagoj de ĉiu duona lunmonato.]

*259. Demando: Ĉu ekzistas apartaj ekzercreguloj por la gvidado kaj disciplino de la ordeno?*

Respondo: Jes, 250 da ili, sed ĉiujn oni povas lokigi sub tiuj kvar rubrikoj:

Ĉefaj disciplinreguloj (*patimokkha-samvara-sila*)

Reguloj por bridi la sensojn (*indriya-samvara-sila*)

Reguloj kiel ĝuste ricevi kaj uzi manĝaĵojn, vestojn ktp (*passaya-sanissita-sila*)

Reguloj kiel vivi senmakulan vivon (*ajivapari-suddha-sila*)

*260: Demando: Diru kelkajn krimojn kaj regulrompojn aparte malpermesitanj al bhikŝuoj!*

Respondo: Veraj bhikŝuoj

ne detruas la vivojn de iuj estaĵoj,

ne ŝtelas,

ne false montras ”okultajn” fortoj por trompi iun,

ne seksumas,

ne mensogas,

ne ebriigas sin, nek manĝas je maltaŭgaj horoj,

ne ĝuas dancon, kanton, muzikon kaj distraĵojn,

ne uzas altajn kaj grandajn litojn, donacojn de oro, arĝento, nekuiritajn grajnoj kaj viandon, virinojn kaj knabinojn, sklavojn, bovojn, elefantojn ktp,

ne kalumnias,

ne parolas akre, riproĉe aŭ senenhave,

ne legas aŭ aŭskultas fabelojn,

ne portas mesaĝojn el kaj al laikoj,

ne aĉetas kaj vendas,

ne trompas kaj subaĉetas,

ne malliberigas, rabas kaj minacas aliajn, kaj

ne ekzercas certajn magiojn artojn kaj sciencojn, kiel astrologion, manlegado aŭ alia sortodiveno, kaj aliajn sciencojn klasifikataj kiel magio. Se oni praktikas iun el tiuj, tio malfruigas la progreson ĉe tiu, kiu provas atingi nirvanon.

*261. Demando: Kiujn devojn bhiksŭoj havas al laikoj?*

Respondo: Ĝenerale esti modeloj pri la plej alta moralo, instrui ilin, prelegi kaj klarigi la doktrinon, reciti *paritta* (konsolantajn tekstojn) por malsanuloj, kaj publike en tempoj de publika mizero, kiam petataj, kaj senĉese admoni homojn agi morale ĝuste. Ili deadmonu ilin de malbonfaroj, estu kompataj kaj molkoraj kaj provu favori la bonon de ĉiuj estaĵoj.

*262. Demando: Kiuj estas la reguloj pri eniro en la ordenon?*

Respondo: La kandidato kutime ne estas akceptata se li ne havas almenaŭ dek jarojn, li ne suferu de lepro, abscesoj, ftizo aŭ epilepsio, li estu libera homo, li ne havu ŝuldojn, li ne estu krimulo aŭ kripla aŭ en reĝa servo.

*263. Demando: Kiel oni nomas lin dum li estas novico?*

Respondo: Ŝramanero aŭ disĉiplo.

[Lia rilato al sia guroo, aŭ instruisto, preskaŭ similas al tiu de baptofilo al sia baptopatro inter kristanoj, sed pli

reala, ĉar la instruisto iĝas por li patro, patrino, familio kaj ĉio.]

*264. Demando: Je kiu aĝo, ŝramanero povas iĝi monaĥo?*

Respondo: Li havu almenaŭ dudek jarojn.

*265. Demando: Kio okazas kiam li estas preta esti ordinata?*

Respondo: Dum kunveno de bhikŝuoj, lin prezentas bhikŝuo kiu raportas ke li estas kvalifikita, kaj la kandidato diras: "Mi petas la sanghon pri la *upasampada*-ceremonio, ktp." Post tio, lia prezentanto rekomendas ke li estu ricevata. Do li estas akceptata.

*266. Demando: Kaj poste?*

Respondo: Poste, li metas sur sin la bhikŝuaj vestoj kaj ripetas la tri rifuĝojn (*tisarana*) kaj la dek ekzerc-regulojn (*dasa-sila*).

*267. Demando: Kiuj estas la du esencaj aferoj observendaj?*

Respondo: Malriĉeco kaj ĉasteco. Antaŭ esti ordinata, bhikŝuo devas havi ok aferojn: siajn vestojn, zonon, almoz-bovlon, akvo-filtrilon, razilon, pinglon, ventumilon, sandalojn. Ene de limoj strikte specifikitaj en *vinaya*, li povas posedi ankaŭ kelkajn aliajn aferojn.

*268. Demando: Kiel pri la publika konfeso de eraraj agoj?*

Respondo: Unu fojon ĉiun duan semajnon, oni faras *patimokkha*-ceremonion por lasi la ŝarĝojn, kiam ĉiu bhikŝuo konfesas al la komunumo erarojn de li faritajn, kaj akceptas eventualan pentofaron.

*269. Demando: Kiun ĉiutagan rutinon li devas sekvi?*

Respondo: Li ellitiĝas antaŭ la taglumo, lavas sin, balaas la viharon, balaas ĉirkaŭ la bodhi-arbo kiu kreskas proksime al ĉiu viharo, alportas trinkakvon por la tago kaj filtras ĝin, retiriĝas kaj meditadas, donas florojn al la stupao, aŭ relikvujo, aŭ al la bodhi-arbo. Poste, li prenas sian almozbovlon kaj iras de domo al domo por kolekti manĝaĵojn – pri kiuj li ne rajtas peti, sed ricevi en la bovlon kiam la familioj donas ilin



libervole. Li reiras, lavas la piedojn kaj manĝas, kaj poste li plimeditadas.

*270. Demando: Ĉu ni devas kredi ke flor-ofero (mala-puja) kiel pia ago ne kunportas iun meriton?*

Respondo: La ago en si mem ne kunportas meriton, kiel nura formalajo, sed se oni oferas florojn kiel la plej dolĉan, puran esprimon de profunde sentata respekto al sankta estaĵo, tiam la ofero vere estas ago nobliga kaj pia.

*271. Demando: Kion la bhiksuo faras poste?*

Respondo: Li daŭrigas siajn studojn. Kiam la suno subiras, li denove balaas la sanktajn lokojn, lumigas lampon, aŭskultas sian instruiston kaj konfesas al li la erarojn kiujn li eble faris.

*272. Demando: Kiuj estas la bazoj de liaj kvar seriozaj meditadoj (sati-patthana)?*

Respondo: 1. La korpo (*kayanupassana*)

2. La sentoj (*vedananupassana*)

3. La senso (*cittanupassana*)

#### 4. La doktrino (*dhammanupassana*)

*273. Demando: Kio estas la celo de la kvar grandaj penoj (samanappadhana)?*

Respondo: Bridi siajn bestajn dezirojn kaj kreski en boneco.

*274. Demando: Kiam bhikŝuo vidu la plej altan veron, ĉu laŭdire tiam la racio plej gravas aŭ intuicio?*

Respondo: Intuicio – mensa stato kie oni tuj komprenas ĉiun deziratan veron.

*275. Demando: Kaj kiam tiu evoluo estas atingebla?*

Respondo: Kiam oni atingas la kvaran evolustadion, per ekzercado de *jñana*.

*276. Demando: Ĉu ni kredu ke la menso, en la fina stadio de jñana, kaj en la stato nomata samadhi, estas blanka kaj ke la pensado estas haltigita?*

Respondo: Tute male. Ĝuste tiam, onia konscio estas plej aktiva, kaj onia kapablo gajni konon estas analoge granda.

*277. Demando: Provu doni komparon!*

Respondo: En la ordinara veka stato, onia komprenkampo estas same limigita kiel la vidkampo por homo kiu iras laŭ vojo inter altaj montoj; en la pli alta konscio de *jñana* kaj *samadhi*, oni vidas kiel aglo, kiu flugas alte kaj rigardas tutan landon.

*278. Demando: Kion niaj libroj diras pri kiel la Budho uzis tiun kapablon?*

Respondo: Ili diras ke li havis la kutimon ĉiumatene superrigardi la mondon kaj, kun sia klarvida rigardo, vidi kie estas homoj pretaj ricevi la veron. Poste, li provis igi la veron atingi ilin, se tio eblis. Kiam homoj vizitis lin, li rigardis en iliajn mensojn, legis iliajn sekretajn motivojn kaj poste instruis ilin laŭ iliaj bezonoj.

#### 4. La ekesto kaj disvastiĝo de la budhismo

*279. Demando: Kiom da anoj la budhismo havas ĝuste nun, kompare al la aliaj grandaj religioj?*

Respondo: La anoj de la budha dharmo estas pli multaj ol tiuj de iu alia religia instruisto.

*280. Demando: Kiom laŭtakse?*

Respondo: Ĉirkaŭ kvincent milionoj, tio estas 5/13, iom malpli ol duono de la kalkulita nombro da homoj en la mondo.

[Rimarko de la tradukinto: La nombro, do, en la jaro de la anglalingva eldono, 1908.]

*281. Demando: Ĉu multaj grandaj bataloj okazis, ĉu multaj landoj estis konkeritaj, ĉu multe da homa sango estis elversita, por disvastigi la budhan dharmon?*

Respondo: La historio ne dokumentis ke iuj tiaj kruelaĵoj kaj krimoj okazis por disvastigi nian religion. Laŭ nia scio, por ĝi eĉ ne unu guto da sango estis elversita. (Vidu la piednoton al demando 202!)

*282. Demando: Kiu do estas la sekreto de ĝia eksterordinara disvastigo?*

Respondo: Ne povas estas iu alia ol ĝiaj propraj kvalitoj: ĝia memevidenta bazo en la vero, ĝia sublima moraldoktrino, kaj ĝia sufiĉo por ĉiuj homaj bezonoj.

*283. Demando: Kiel ĝi disvastiĝis?*

Respondo: Dum siaj kvardek kvin jaroj kiel instruisto, la Budho vagadis vaste en Hindio kaj predikis la dharmon. Li sendis siajn plej.sagajn kaj bonajn disĉiplojn por ke ili faru same en tuta Hindio.

*284. Demando: Kiam li elsendis siajn unuajn misiistojn?*

Respondo: La plenlunan tagon de oktobro.

*285. Demando: Kion li diris al ili?*

Respondo: Li kunvenigis ilin kaj diris: ”Eliru, ho bhikŝuoj, kaj prediku la doktrinon al la mondo. Agu por la bono de aliaj same kiel por

via propria... Elportu la ĝojan mesaĝon al ĉiu homo. Ne iru du el vi la saman vojon.”

*286. Demando: Kiom longe antaŭ la komenco de la kristana kronologio okazis tio?*

Respondo; Ĉirkaŭ 600 jarojn.

*287. Demando: Kiu helpo venis el reĝoj?*

Respondo: Krom la malsuperaj klasoj, konvertiĝis ankaŭ grandaj reĝoj, raĝoj kaj maharaĝoj, kaj ilia influo helpis la disvastigon de la religio.

*288. Demando: Kaj pilgrimuloj?*

Respondo: Kleraj pilgrimuloj venis dum pluraj jarcentoj al Hindio kaj kunportis reen la librojn kaj doktrinojn al siaj propraj landoj. Iom post iom, tial tutaj popoloj lasis siajn proprajn kredojn kaj iĝis budhanoj.

*289. Demando: Kiun, pli ol iun alian, la mondo devas danki pro la daŭra fondo de la religio de la Budho?*

Respondo: La imperiestron Asoko aŭ Ashoko, kun la kromnomo "la granda", foje Piyadassi aŭ Priyadarshin, foje Dharmashoka. Li estis filo de Bindusara, reĝo de Magadho, kaj nepo de Chandragupta, kiu forĉasis la grekojn el Hindio.

*290. Demando: Kiam li regis?*

Respondo: Dum la tria jarcento a. Kr., ĉirkaŭ ducent jarojn post la tempo de la Budho. La historiistoj ne tute samopinias pri la ekzakta tempo, sed preskaŭ.

*291. Demando: Kio faris lin granda?*

Respondo: Li estis la plej potenca monarko en la historio de Hindio, kiel militisto kaj ŝtatesto, sed liaj plej noblaj kvalitoj estis lia amo al la vero kaj justeco, toleremo al religiaj malsamecoj, justa regado, ĝentileco al malsanuloj, malriĉuloj kaj bestoj. Lia nomo estas honorigata inter Siberio kaj Cejlono.

*292. Demando: Ĉu li naskiĝis budhano?*

Respondo: Ne. Lin konvertis la arahanto Nigrodha Samanera.

*293. Demando: Kion li faris por la budhismo?*

Respondo: Li forĉasis malbonajn bhikŝuojn, kuraĝigis bonajn, konstruigis monaĥejojn kaj stupaojn ĉie, establis ĝardenojn, malfermis malsanulejojn por homoj kaj bestoj, kunvenigis koncilion en Patna por ekzameni kaj restarigi la dharmon, progresigis religian edukadon de virinoj kaj sendis ambasadojn al kvin grekaj reĝoj, siaj aliancanoj, kaj al ĉiuj regantoj en Hindio, por prediki la doktrinojn de la Budho. Estis li kiu konstruigis la monumentojn en Kapilavastu, Buddha Gaja, Isipatana kaj Kusinara, niaj kvar ĉefaj pilgrimlokoj, kaj miloj pli da.

*294. Demando: Kiuj absolutaj pruvoj ekzistas pri lia nobla karaktero?*

Respondo: Dum la lastaj jaroj oni trovis, en ĉiuj partoj de Hindio, 14 ediktojn kiujn li verkis kaj ĉizigis en rokojn, kaj 8 en kolonojn starigitajn laŭ lia ordono. Ili plene pravas ke li estis unu el la plej saĝaj kaj altanimaj regantoj kiuj iam vivis.

*295. Demando: Kiujn kvalitojn tiuj tekstoj atribuas al la budhismo?*



Respondo: Ili montras ke ĝi estas religio de nobla toleremo, de ĉion ampleksanta frateco, de virto kaj justeco. Ĝi havas neniun makulon de egoismo, sektismo aŭ netoleremo. Tiuj ediktoj pli ol io alia helpis al la budhismo gajni la respekton, kiun ĝi nun havas ĉe la grandaj kleruloj de la okcidento.

*296. Demando: Kiun tre valoran donacon Dharmashoka faris al la budhismo?*

Respondo: Li donis sian amatan filon Mahinda, kaj sian filinon Sanghamitta, al la ordeno kaj sendis ilin al Cejlono por enkonduki la religion tie.

*297. Demando: Ĉu tio estas dokumentita en la historio de Cejlono?*

Respondo: Jes, ĉio estis dokumentata en Mahavansa de tiuj kiuj prizorgis la reĝajn kronikojn, kiuj vivis tiam kaj renkontis la misiistojn.

*298. Demando: Ĉu ankoraŭ ekzistas videbla pruvo pri la misio de Sanghamitta?*

Respondo: Jes. Al Cejlono ŝi kunportis branĉon de ĝuste tiu bodhi-arbo, sub kiu la Budho sidis kiam li iĝis lumiĝinto, kaj ĝi ankoraŭ kreskas.

*299. Demando: Kie?*

Respondo: En Anuradhapura. Ĝia historio estas oficiale gardita ĝis niaj tagoj. La arbo estis plantita en la jaro 306 a. Kr. Ĝi estas la plej malnova historia arbo en la mondo.

*300. Demando: Kiu regis en Cejlono tiutempe?*

Svar: Devanampiyatissa. Lia edzino, la reĝino Anula, invitis Sanghamittan veni kaj establi la virinan branĉon de la ordeno.

*301. Demando: Kiu venis kun Sanghamitta?*

Respondo: Multaj aliaj bhikŝuinoj. Iom post iom, ŝi akceptis la reĝinon kaj multaj el ŝiaj korteganinoj.

*302. Demando: Ĉu ni povas vidi la spurojn de la misia agado de la imperiestro Asoko en eksterlando?*

Respondo: Liaj filo kaj filino enkondukis la budhismon en Cejlonon, liaj monaĥoj donis ĝin al la tuta norda Hindio, al dek kvar hindaj landoj ekster la limoj de la regno, kaj al kvin grekaj reĝoj, liaj aliancanoj, kun kiuj li interkonsentis akcepti liajn religiajn predikantojn.

*303. Demando: Ĉu vi povas nomi ilin?*

Respondo: Antioĥo en Sirio, Ptolemeo en Egiptio, Antigono en Makedonio, Margo en Kireno kaj Aleksandro en Epiro.

*304. Demando: Kie ni lernas tion?*

Respondo: En la ediktoj de Asoko la Granda mem, ĉizitaj laŭ lia ordono en rokoj kaj ŝtonaj kolonoj, ankoraŭ starantaj kaj videblaj por iu ajn kiu volas viziti la lokojn.

*305: Demando: Tra kiuj okcidentaj fratofluoj, la budha dharmo miksiĝis kun okcidenta pensado?*

Respondo: Tra la sekto de la terapeŭtoj en Egiptio, kaj tiu de la esenoj en Palestino.

*306. Demando: Kiam budhismaj libroj estis unue enportitaj en Ĉinion?*

Respondo: Jam en la dua kaj tria jarcentoj p. Kr. Kvin el la monaĥoj de Dharmashoka – laŭ *Samanta-pasadika* kaj *Sarattha-dipani*, du palilingvaj libroj – estis sendataj al la kvin ĉefaj partoj de Ĉinio.

*307 Demando: De kie kaj kiam, la budhismo atingis Koreion?*

Respondo: El Ĉinio en la jaro 372 p. Kr.

*308. Demando: De kie kaj kiam, la budhismo atingis Japanion?*

Respondo: El Korio en la jaro 552 p. Kr.

*309. Demando: De kie kaj kiam, la budhismo atingis Koĉinĉinon, Formozon, Javon, Mongolion, Jarkandon, Balĥon, Buĥaron, Afghanistanon kaj aliajn centraziajn landojn?*

Respondo: Plej verŝajne en la kvar kaj kvina jarcentoj p. Kr.

*310. Demando: Kien kaj kiam la budhismo disvastiĝis el Cejlono?*

Respondo: Al Birmo en la jaro 950 p. Kr., kaj de tie iom post iom al Arakano, Kamboĝo kaj Peguo. En la sepa jarcento (en la jaro 638 p. Kr.), la budhismo venis al Siamo, kie ĝi nun estas, kaj ekde tiam ĉiam estis, ŝtatreligio.

*311. Demando: Kien la budhismo disvastiĝis el Kaŝmiro, krom al Ĉinio?*

Respondo: Al Nepalo kaj Tibeto.

*312. Demando: Kial la budhismo, iam la ĉefa religio en tuta Hindio, nun estas tie preskaŭ tute malaperinta?*

Respondo: La budhismo estis unue pura kaj nobla, la doktrino de la tiel evoluinta mem; ĝia sangho estis virta kaj obeis la regulojn, gajnis ĉiujn korojn kaj disvastigis ĝojon ĉe multaj popoloj, kiel la matena lumo sendas vivon tra la floroj. Sed post kelkaj jarcentoj, malbonaj bhikŝuoj ricevis ordinadon (*upasampada*), la sangho iĝis riĉa, maldiligenta kaj voluptama, la dharmo degeneris, kaj la hindaj popoloj forlasis ĝin.

*313. Demando: Ĉu en la naŭa aŭ deka jarcento okazis io, kiu rapidigis tiun degeneron?*

Respondo: Jes.

*314. Demando: Ĉu io alia ol la degenero de la spiriteco, la korupto de la sangho kaj la reigo de la popolamaso el alta homidealo al malinteligenta idol-adorado?*

Respondo: Jes. Oni diras ke islamanoj invadis kaj konkeris grandajn partojn de Hindio, kaj ke ili ĉie faris ĉion kion ili kapablis por neniigi nian religion..

*315. Demando: Pri kiuj kruelaj agoj oni akuzas ilin?*

Respondo: Ili bruligis, malkonstruis aŭ alimaniere detruis niajn viharojn, murdis niajn bhikŝuojn kaj ĵetis niajn religiajn librojn en la fajron.

*316. Demando: Ĉu nia literaturo estis tute detruita en Hindio?*

Respondo: Ne. Multaj bhikŝuoj fuĝis trans la limo al Tibeto kaj aliaj sekuraj rifuĝoj, kaj kunportis siajn librojn.

*317. Demando: Ĉu oni lastatempe trovis iujn spurojn de tiuj libroj?*

Respondo: Jes. Rai Bahadur Sarat Chandra Das, C. I. E., konata bengala klerulo, vidis centojn da ili en la viharaj bibliotekoj en Tibeto, kunportis kopiojn de kelkaj el la plej gravaj reen, kaj nun estas dungita de la hinda registaro por redakti kaj publikigi ilin.

*318. Demando: En kiu lando ni havas kialon kredi ke la sanktaj libroj de la origina budhismo estis plej bone konservitaj kaj malplej difektitaj?*

Respondo: Cejlono. *Encyclopaedia Britannica* diras ke sur tiu insulo la budhismo, pro certaj kialoj, "konservis preskaŭ sian originan purecon ĝis modernaj tempoj".

*319. Demando: Ĉu iu ekzameno de la teksto en la Pitakoj estis farita en modernaj tempoj?*

Respondo: Jes. Zorgema ekzameno de *Vinaya-pitaka* estis farita en Cejlono en la jaro 1875 p. Kr. de kelkaj el la plej kleraj bhikŝuoj, gvidataj de H. Sumangala Pradhana Sthavira.

*320. Demando: Ĉu okazis iu amikeca kunestado en la intereso de la budhismo inter la popoloj en la sudaj kaj nordaj budhismaj landoj?*

Respondo: En la jaro 1891 p. Kr., sukcesa provo estis farita igi la *pradhana-nayaka* de la du grandaj branĉoj interkonsenti pri dek kvar proponoj esprimi fundamentajn budhismajn opiniojn, kiel agnoskataj kaj instruataj de la du skoloj. Tiuj proponoj, formulitaj de la kolonelo Olcott, estis zorgeme tradukataj al la birma, sinhala kaj japana lingvoj, diskutataj po unu, unuanime akceptataj kaj subskribataj de la ĉefaj monaĥoj, kaj publikigataj en januaro 1892.

*321. Demando: Kun kiu bona rezulto?*

Respondo: Rezulte de la bona kompreno, kiu nun ekzistas, kelkaj japanaj monaĥoj kaj novicejoj estis sendataj al Cejlono por studi la palian kaj sanskritan lingvojn.

*322. Demando: Ĉu estas iuj signoj ke la prestiĝo de la budha dharmo kreskas en ne-budhismaj landoj?*

Respondo: Jes ja. Tradukoj de niaj pli valoraj libroj estas publikigataj, multaj artikoloj aperas



en ĵurnaloj kaj gazetoj, eminentaj originaj disertacioj de elstaraj verkistoj same aperas. Cetere, kaj budhismaj kaj ne-budhismaj prelegantoj parolas pri la budhismo al grandaj aŭskultantaroj en la okcidento. La japana ĝodoŝinŝu-sekto antaŭnelonge fondis centrojn en Honolulu, San Francisco, Sacramento kaj aliaj usonaj lokoj.

*323. Demando: Kiuj du el niaj ĉefaj ideoj precipe kaptas okcidentajn pensojn?*

Respondo: Karmo kaj renaskiĝo. Estas tre surprize kiel rapide ili estis akceptataj.

*324. Demando: Kion oni kredas estas la kialo de tio?*

Respondo: La fakto ke ili akordas kun la natura instinkto al justeco, kaj ke ili estas evidente akcepteblaj.

[Vidu la apendicon!]

## 5. Budhismo kaj scienco

*325. Demando: Ĉu la budhismon oni iel rajtas rigardi kiel religion sciencan, aŭ ĉu ĝi estas klasifikebla kiel religio "rivelita"?*

Respondo: Ĝi tute ne estas religio rivelita. La Budho ne diris ke ĝi estas tio, kaj ĝi ne estas tiel rigardata. Male, li prezentis ĝin kiel esprimon de eternaj veroj, kiujn liaj antaŭuloj instruis same kiel li mem.

*326. Demando: Denove ripetu la nomon de la sutro, kie la Budho diras al ni ke ni ne kredu je iu asertita rivelilo, sen kompari ĝin kun nia propra racio kaj nia propra sperto!*

Respondo: *Kalama-sutta* en *Anguttara-nikaya*.

*327. Ĉu la budhanoj akceptas la teorion ke iu kreanto formis ĉion el nenio?*

Respondo: La Budho diris ke du aferoj ne havas kaŭzon: akaŝo kaj nirvano. Ĉio venis el akaŝo, laŭ movleĝo tie estanta, kaj poste ĉesas post certa ekzisto. Nenio iam venis el nenio. Ni ne kredas je mirakloj, tial ni neas la kreon, kaj ni ne povas imagi ke io estas kreita el nenio. Nenio

organa estas eterna. Ĉio estas en stato de ĉiama fluado, ŝanĝiĝas kaj aliformiĝas kaj konservas la kontinuecon laŭ la evolu-leĝo.

*328. Demando: Ĉu la budhismo estas kontraŭ edukado kaj scienca studado?*

Respondo: Tute male. En *Sigalovada-sutta*, unu el la paroloj de la Budho, li aparte diris ke unu el la devoj de instruistoj estas doni al siaj lernantoj ”instruadon pri scienco kaj kono”. La pli alta instruado de la Budho estas por la ilumiĝintaj, la saĝaj, la pensantaj.

*329. Demando: Ĉu vi povas montri iun alian lokon, kie la budhismo apogas sciencon?*

Respondo: La instruo de la Budho diras ke la homaro havis multajn antaŭantojn, kaj ke estas principo de diferenco inter homoj; certaj individuoj havas pli grandan kapablon rapide atingi saĝecon kaj nirvanon ol aliaj.

*330. Demando: Ĉu io alia?*

Respondo: La budhismo apogas la aserton ke energio estas nedetruibla.

*331. Demando: Ĉu oni nomu la budhismon scienca prezento aŭ moralkodo?*

Respondo: Strikte dirite pura moralfilozofio, sistemo de etiko kaj transcenda metafiziko. Ĝi estas tiel eminente praktika, ke la Budho silentis kam Malunka demandis pri la origino de la aferoj.

*332. Demando: Kial li faris tion?*

Respondo: Ĉar li pensis ke nia ĉefa celo estu vidi la aferojn kiaj ili estas ĉirkaŭ ni, kaj provi plibonigi ilin, ne malŝpari tempon je intelekta spekulado.

*333. Demando: Kion budhanoj diras estas la kialo ke malbonaj gepatroj foje havas tre bonajn kaj saĝajn infanojn, kaj ke bonaj gepatroj havas tre malbonajn infanojn?*

Respondo: La kialo estas la respektivaj karmoj de infanoj kaj gepatroj. Ĉiu el ili eble meritis ke tial neoftaj rilatoj ekestu en la nuna naskiĝo.

*334. Demando: Ĉu ie estas dirite ke la korpo de la Budho elradiis fortan lumon?*

Respondo: Jes, tio estis dieca radiado sendita elinterne per la forto de lia sankteco.

*335. Demando: Kiel oni nomas ĝin en la palia lingvo?*

Respondo: *Buddharansi*, budha radiado.

*336. Demando: Kiom da koloroj oni povis vidi en ĝi?*

Respondo: Ses, en tri duopoj.

*337. Demando: Iliaj nomoj?*

Respondo: *Nila, pita, lohita, avadata, mangasta, pabhassara.*

*338. Demando: Ĉu aliaj homoj elradiis tian fortan lumon?*

Respondo: Jes, ĉiuj arahantoj faris tion, kaj la lumo fakte estas pli forta proporcie al la spirita evoluo de la individuo.

*339. Demando: Kie ni vidas tiujn kolorojn prezentitaj?*

Respondo: En ĉiuj viharoj, kie estas pentritaj bildoj de la Budho. Oni povas vidi ilin ankaŭ en la budhisma flago, farita unue en Cejlono sed nun akceptita vaste en ĉiuj budhismaj landoj.

*340. Demando: En kiu parolo, la Budho mem parolas pri tiu lumo ĉirkaŭ li?*

Respondo: En *Maha-parinibbana-sutta*. Ananda, lia ĉefa disĉiplo, rimarkis la fortan brilon kiu venis el la korpo de lia majstro, kaj la Budho diris ke tio okazas je du okazoj: a. tuj kiam iu tiel evoluinta atingis la plej altan komprenon, kaj b. dum la nokto kiam li lastafoje forpasas.

*341. Demando: Kie ni legas ke tiu forta lumo radias el la korpo de alia budho?*

Respondo: En la rakonto pri Sumedha kaj Dipankara Budho, kiun oni trovas en *Nidanakatha* en la *Jataka*-libro, aŭ la rakonto pri la renaskiĝoj de la bodhisatvo Siddhartha Gautama.

*342. Demando: Kiel ĝi estas priskribita?*

Respondo: Kiel klaftprofunda glorkrono.

*343. Demando: Kiel la hinduoj nomas ĝin?*

Respondo: *Tejas*; ĝian etenditan radiadon ili nomas *prakasha*.

*344. Demando: Kiel la eŭropanoj nomas ĝin nun?*

Respondo: La homa aŭro.

*345. Demando: Kiu granda sciencisto pruvis la ekziston de tiu aŭro per zorge faritaj eksperimentoj?*

Respondo: La barono von Reichenbach. Liaj eksperimentoj estas plene priskribitaj en liaj esploroj, eldonitaj 1844-1845. Dr. Baraduc en Parizo lastatempe fotografiis tiun lumon.

*346. Demando: Ĉu tiu forta aŭro estas miraklo aŭ natura fenomeno?*

Respondo: Natura. Estas pruvite ke ne nur homoj havas ĝin, sed ankaŭ bestoj, arboj, plantoj kaj eĉ ŝtonoj.

*347. Demando: Kiun apartan kvaliton ĝi havas kiam temas pri budho aŭ arahanto?*

Respondo: Ĝi estas multege pli luma kaj granda ol kiam temas pri aliaj vivantoj kaj aĵoj. Ĝi estas la pruvo pri ilia supera evoluo en la forto de *iddhi*. Oni vidis la lumon veni el stupaoj en Cejlono, kie oni asertas ke oni havas relikvojn de la Budho

*348. Demando: Ĉu ankaŭ anoj de aliaj religioj ol la budhismo kaj hinduismo kredas je tiu lumo?*

Respondo: Jes. En ĉiuj bildoj de kristanaj pentristoj oni povas vidi tiun lumon ĉirkaŭ la korpoj de iliaj sanktuloj. Oni povas trovi ke la sama kredo ekzistis ankaŭ en aliaj religioj.

*349. Demando: Kiu historia okazo konfirmas la modernan teorion pri hipnota sugestio?*

Respondo: Tiu pri Chullapanthaka, rakontita en la palia komentario al la Dharmo-pado, ktp.

*350. Demando: Donu al mi la faktojn!*

Respondo: Li estis bhikŝuo kiu iĝis arahanto. Ĝuste tiun tagon, la Budho sendis mesaĝiston por venigi lin. Kiam tiu venis al la viharo, li vidis grupon de tricent bhikŝuoj, kaj ĉiuj



aspektis ekzakte same. Kiam li demandis kiu estas Chullapanthaka, ĉiu el la tricent respondis: "Mi estas Chullapanthaka."

*351. Demando: Kion faris la mesaĝisto?*

Respondo: Konfuzite, li revenis al la Budho kaj raportis.

*352. Demando: Kion la Budho tiam diris al li?*

Respondo: Ke li revenu al la viharo kaj, se la sama afero okazos denove, prenu subbrake la unuan kiu asertis ke li estas Chullapanthaka, kaj konduku tiun al li. La Budho sciis ke la nova arahanto montros sian akiritan kapablon donante al la mesaĝisto falsajn bildojn de si mem.

*353. Demando: Kiel oni nomas, en la palia lingvo, tiun iluziforton?*

Respondo: *Manomaya iddhi.*

*354. Demando: Ĉu la iluziaj kopioj de la persono de la arahanto estis materiaj? Ĉu ili konsistis el materio, kaj ĉu la mesaĝisto povus senti ilin kaj tuŝi ilin?*

Respondo: Ne. Ili estis bildoj kreitaj de liaj penso kaj trejnita volforto por la menso de la mesaĝisto.

*355. Demando: Al kio oni povas kompari ilin?*

Respondo: Al la spegurbildo de homo; ĝi tute similas al li, sed ĝi ne estas solida.

*356. Demando: Kio estis necesa por montri al la mesaĝisto tian iluzion?*

Respondo: Ke Chullapanthaka klare imagu kiel li aspektas, kaj poste multobligu la bildon tiom da fojoj kiom li volis, kaj metu ĝin en la impreseblan cerbon de la mesaĝisto.

*357. Demando: Kiel oni nun nomas tiun proceson?*

Respondo: Hipnota sugestio.

*358. Demando: Ĉu ankaŭ iu tria partio povus vidi tiujn iluziajn formojn?*

Respondo: Tio dependus de la volo de la arahanto, aŭ hipnotisto.

*359. Demando: Kion vi volas diri?*

Respondo: Se kvindek aŭ kvincent homoj estus tie, anstataŭ nur unu, la arahanto povus decidi ke ĉiuj vidu la iluzion sammaniere, aŭ, se li tiel preferus, ke nur la mesaĝisto vidu ĝin.

*360. Demando: Ĉu tiu branĉo de scienco estas bone konata en niaj tagoj?*

Respondo: Tre bone konata. Ĝin konas ĉiuj kiuj studas mesmerismon kaj hipnozon.

*361. Demando: Kiel nia moderna scienco apogas la teorion pri karmo, kiel instruata de la budhismo?*

Respondo: Modernaj sciencistoj diras ke ĉiu generacio de homoj estas heredantoj de la virtoj kaj malvirtoj de la antaŭa, ne en la amaso kiel tia, sed en ĉiu unuopa kazo. Ĉiu el ni ricevas, laŭ la budhismo, naskiĝon kiu reprezentas la kialojn kiujn li kaŭzis en antaŭa naskiĝo. Tio estas la ideo pri karmo.

*362. Demando: Kion diras Vasettha-sutta pri kaŭzoj en la naturo?*

Respondo: Ĝi diras: ”La mondo ekzistas pro kaŭzoj, ĉiuj aferoj ekzistas pro kaŭzoj, ĉiuj estaĵoj estas ligitaj de kaŭzoj.”

*363. Demando: Ĉu la budhismo diras ke la videbla universo estas neŝanĝebla: nia tero, la suno, la luno, la steloj, la mineraloj, la plantoj, la bestoj kaj la homoj?*

Respondo: Ne. Ĝi diras ke ĉio ĉiam ŝanĝiĝas, kaj ĉio devas iam malaperi.

*364. Demando: Por neniam reveni?*

Respondo: Ne tiel. La evoluprincipo, gvidata de karmo, individue kaj kolektive, evoluigos alian universon kun ĝia enhavo, kiel nia universo evoluis el akaŝo.

*365. Demando: Ĉu la budhismo akceptas ke la homo en sia naturo havas iun latentan forton kaŭzi fenomenojn kutime nomatajn ”mirakloj”?*

Respondo: Jes, sed ili estas naturaj, ne supernaturaj. Eblas evoluigi ilin per certa sistemo priskribita en niaj sanktaj libroj, ekzemple *Visuddhi-magga*.

366. *Demando: Kiel oni nomas tiun scienco-branĉon?*

Respondo: La palia vorto estas *iddhi-vidhanana*.

367. *Demando: Kiom da specoj ekzistas?*

Respondo: Du: *bahira*, t. e. unu kie la fenomenkreanta forto povas esti portempe akirata per asketa ekzercoj, kaj ankaŭ per uzado de drogoj, recitado de mantraj kaj aliaj eksteraj rimedoj; kaj *asanika*, kie tiu forto estas akirata per interna mem-evoluo, kaj kovras ĉiujn fenomenojn de *laukika-iddhi*, kaj pli ol tio.

368. *Demando: Kiaj homoj ĝuas tiujn fortojn?*

Respondo: Ili evoluas iom post ion ĉe iu, kiu sekvas certan vojon de asketaj ekzercoj, nomata *jhana* aŭ *dhyana*.

369. *Demando: Ĉu tiu iddhi-forto povas esti perdata?*

[Sumangala Sthavira klarigas al mi ke tiujn transcendajn fortojn povas daŭre posedi nur iu, kiu venkis ĉiujn pasiojn (*klesa* aŭ *kilesa*), do alivorte arahanto. La fortojn povas evoluigi malica homo, kiu povas uzi ilin por malicaj celoj, sed ilia efiko ne daŭras longe, la ribelaj

pasioj denove regas la sorciston, kaj li finfine iĝas ilia viktimo.]

Respondo: *Bahira* povas esti perdata, sed neniam *sasanika*, se jam akirita. Se oni jam akiris *lokottara*-konon, tiu neniam povas esti perdata, kaj nur per tiu kono, arahanto povas koni la absolutan staton de nirvano. Kaj tiun konon oni povas akiri sekvante la noblan vivon de la okera vojo.

370. *Demando: Ĉu la Budho havis lokottara-iddhi?*

Respondo: Jes, perfekte.

371. *Fråga: Ĉu ankaŭ liaj disĉiploj havis ĝin?*

Respondo: Jes, kelkaj el ili, sed ne ĉiuj sam-amplekse. La kapablo akiri tiujn kaŝitajn fortojn varias de persono al persono.

372. *Demando: Donu ekzemplon!*

Respondo: El ĉiuj disĉiploj de la Budho, Moggallana havis la plej rimardindan kapablon krei tiajn fenomenojn, dum Ananda ne povis evoluigi iun tian kapablon dum la 25 jaroj kiam

li estis la persona kaj proksima disĉiplo de la Budho mem. Poste li faris tion, kiel la Budho antaŭdiris.

*373. Demando: Ĉu oni ekhavas tiujn fortojn tuj aŭ iom post iom?*

Respondo: Normale, ili evoluas iom post iom, kiam la disĉiplo pli kaj pli kontrolas sian malaltan naturon en vico da naskiĝoj.

[Kiam la fortoj montras sin subite, oni povas konkludi ke tiu persono evoluis dum sia plej proksima antaŭa naskiĝo. Ni ne kredas je kapricaj rompoj de la naturaj leĝoj.]

*374. Demando: Ĉu la budhismo asertas ke la miraklo revivigi mortintojn estas ebla?*

Respondo: Ne. La Budho diras la malon, en a bela rakonto pri Kisa Gotami kaj la sinapa grajno. Sed se iu nur ŝajnas esti morta, sen fakte esti, eblas vekti lin.

*375. Demando: Donu al mi ideon pri la sinsekvantaj stadioj, kiam lokottara evoluas en iddhi!*

Respondo: Estas ses atingeblaj de arahantoj. La pli altajn povas atingi nur Budho.

*376. Demando: Priskribu la ses stadiojn aŭ gradojn!*

Respondo: Ni povas dividi ilin en du grupoj kun po tri. La unua enhavas

1. progresiva retrospektivo, t. e. iom post iom akirita kapablo vidi retroen en la tempo ĝis la origino de la aferoj,
2. progresiva antaŭvidado,
3. iompostioma estingiĝo de deziro kaj sinkroĉo al materiaj aferoj.

*377. Demando: Kio estus en la dua grupo?*

Respondo: La samaj kapabloj, sed senlime evoluintaj. La plena arahanto do posedas perfektan retrospektivon kaj perfektan antaŭvidadon, kaj tute neniigis la lastajn spurojn de deziro kaj egoisma allogo.

*378. Demando: Kiuj estas la kvar manieroj atingi iddhi?*



Respondo: La volo, ties mobilizo, mensa evoluo kaj distingo inter la ĝusta kaj la malĝusta.

*379. Demando: Niaj libroj rakontas pri centoj da okazoj, kie la arahanto kreis fenomenojn; kion vi diris estas la nomo de tiu kapablo?*

Respondo: *Iddhi-vidha*. Kiu posedas ĝin povas, manipulante la fortojn de la naturo, krei iujn ajn mirindajn fenomenojn, t. e. plenumi kiujn ajn sciencajn eksperimentojn kiujn li volas.

*380. Demando: Ĉu la Budho instigis al montrado de tiaj fenomenoj?*

Respondo: Ne. Li eksplicite malrekomendis tion, ĉar tio facile povas konfuzi tiujn kiuj ne konas iliajn principojn. Tio ankaŭ tentas tiujn kiuj posedas ilin montri ilin nur por kontentigi puran scivolon kaj ilian propran vantemon. Cetere, similajn fenomenojn montras magiistoj lertaj en *laukika*, aŭ la malalta formo de la *iddhi*-scienco. Se iu monaĥo false asertas ke li havas iun supernaturan kapablon, tio estas unu el la nepardoneblaj eraroj (*Tevijja-sutta*).

*381. Demando: Vi menciis ke iu "devao" montris sin al la princo Siddhartha en pluraj formoj. Kion budhanoj kredas pri specoj de elementaj, nevideblaj estaĵoj kiuj havas rilatojn al la homaro?*

Respondo: Ili kredas ke ekzistas tiaj estaĵoj kiuj vivas en siaj propraj mondoj. La budhisma doktrino diras ke arahanto, per interna mem-evoluo kaj per konkero de sia malalta naturo, iĝas supera al eĉ la plej altaj devaĵoj, kaj ke li povas venki kaj regi la malaltajn formojn.

*382. Demandoj: Kiom da specoj de devaĵoj ekzistas?*

Respondo: Tri: *kâmâvâcharâ* (tiuj ankoraŭ regataj de la pasioj, *rûpâvâchara* (pli alta klaso, kun ankoraŭ individua formo, *arûpâvâchara* (la plej altaj kaj puraj, kiuj ne havas materiajn formojn).

*383. Demando: Ĉu ni timu kelkajn el ili?*

Respondo: Kiu estas pura, havas kompaton en la koro kaj kuraĝon en la menso, tiu ne devas timi ion ajn. Neniu homo, dio, *brahmarakkha*, demono aŭ devao povas damaĝi lin, sed kelkaj

havas la kapablon turmenti la malpurajn, kaj  
tiujn kiuj invitas ilin.

## Appendico

La sekvanta teksto, kun la dek kvar tezoj akceptitaj kiel fundamentaj principoj en kaj la suda kaj la norda budhismo, de aŭtoritataj komitatoj, al kiuj mi persone transdonis ilin, estas tiel historie grava ke ĝi estas metata post la nuna eldono de *Budhisma kateĥismo* kiel apendico. Lastatempe raportis al mi la princo Uĉtomskij, la klera rusa orientalistoj, ke kiam ĝi estis tradukita al la plej altaj lamaoj de la grandaj mongolaj budhismaj monaĥejoj, tiuj klarigis al li ke ili akceptas ĉiun el tiuj tezoj kiel skribita, krom nur ke la Budho laŭ ili supozeble vivis ĉirkaŭ mil jarojn pli frue ol mi indikis. Tiun mirigan opinionon mi ne antaŭe renkontis. Ĉu eblas ke la mongola sango intermiksiĝis la veran vivtempon de Sakja-munio kun tiu de lia laŭdire plej proksima antaŭulo? Estu tio iel ajn, tamen estas tre kuraĝige ke oni nun povas diri ke la tuta budhisma mondo unuiĝis almenaŭ pri tiuj dek kvar tezoj.

## **Fundamentaj budhismaj tezoj**

I. Budhanoj estas instruataj montri la saman toleremon, indulgemon kaj fratecan amon al ĉiuj homoj, sen esceptoj, kaj neŝanceleblan ĝentilecon al la membroj de la besta regno.

II. La universo estas evoluinta, ne kreita, kaj ĝi funkcias laŭ la leĝoj de la naturo, ne laŭ la kapricoj de iu dio.

III. La veroj, sur kiuj la budhismo bazas sin, estas naturaj. Ni kredas ke ili estis instruataj dum sinsekvaj kalpoj, aŭ mondaj eraoj, de certaj luminiĝintaj estaĵoj, nomataj "budhoj"; la nomo "Budho" signifas "luminiĝinto".

IV. La kvara instruisto en ĉi tiu kalpo estis Sakja-munio aŭ Gaŭtama Budho, naskita en reĝa familio en Hindio antaŭ ĉirkaŭ 2500 jaroj. Li estas historia persono, kaj lia nomo estis Siddhartha Gaŭtama.

V. Sakja-munio diris ke ne-scio naskas deziron, ke ne-kontentigita deziro kaŭzas renaskiĝon, kaj ke renaskiĝo kaŭzas suferon. Por liberiĝi de sufero, oni tial devas fuĝi de la renaskiĝo, por fuĝi de la renaskiĝo oni devas estingi la deziron,

kaj por estingi la deziron oni devas neniigi la ne-scion.

VI. La ne-scio favoras la kredon ke la renaskiĝo estas io necesa. Kiam la ne-scio estas neniigita, oni perceptas kiel senvalora estas ĉiu tia renaskiĝo, rigardata kiel celo en si mem, same kiel la grandegan bezonon vivi tiel ke la neceso de tiaj ripetataj renaskiĝoj povas esti forigata. La ne-scio naskas ankaŭ la trompigan kaj ne-logikan penson ke homo havas nur unu vivon, kaj la alian iluzion ke tiun solan vivon sekvas statoj de neŝanĝebla ĝuo aŭ turmento.

VII. Ĉiun tiun ne-scion oni povas dispeli se oni persiste praktikas ĉion ampleksantan altruismon en sia konduto, evoluigas sian inteligenton, ekzercas saĝecon en sia pensado kaj neniigas la deziron al malaltaj personaj ĝuoj.

VIII. La deziro vivi estas la kaŭzo de renaskiĝo. Kiam tiu deziro estas estingata, tiam ĉesas la renaskiĝoj, kaj la perfektiginta individuo atingas per meditado la plej altan paco-staton, nomatan nirvano.

IX. Sakja-munio diris ke ne-scio povas esti dispelata kaj sufero forigata per scio pri la kvar noblaj veroj, nome:

1. la suferoj de la ekzisto,

2. la kaŭzo de la sufero, kio estas la ĉiam refoja deziro kontentigi sin mem, sen iam povi certigi tiun celon,

3. la malaperigo de tiu deziro, kiel apartigi sin de ĝi,

4. la manieroj atingi tiun malaperigon de la deziro. La manieroj, kiujn li montris, estas nomataj la nobla okera vojo. t. e. ĝusta rigardado, ĝusta pensado, ĝusta parolado, ĝusta agado, ĝusta vivtenado, ĝusta strebado, ĝusta atentado, ĝusta koncentrado.

X. Ĝusta koncentrado kondukas al spirita luminiĝo, aŭ la evoluo de la budhosimila kapablo latentata en ĉiu homo.

XI. La esenco de la budhismo, kiel resumita de la Budho mem, estas:

Ĉiun malbonon ne fari.

Sanige ekagi.

Propran psikon purigi.

XII. La universo obeas naturan kaŭzaron nomitan "karmo". La meritoj kaj mankoj de iu estaĵo dum antaŭaj vivoj decidas ties kondiĉoj en ĉi tiu. Ĉiu homo do preparis la kaŭzojn de la efikoj kiujn li nun spertas.

XIII. La barojn kontraŭ atingo de bona karmo forigeblas, se oni obeas tiujn regulojn en la budhisma moralnormo, nome: 1. Ne mortigu. 2. Ne ŝtelu. 3. Ne dediĉu vin al malpermesita seksĝuo, 4. Ne mensogu. 5. Ne konsumu ebriigan drogon aŭ trinkaĵon. Kvin pliajn regulojn, ne ĉi tie listigendaj, obeu tiuj kiuj volas, pli rapide ol ordinara laiko, liberigi sin el sufero kaj renaskiĝo.

XIV. La budhismo malkonsilas superstiĉan trofidemon. Gaŭtama Budho diris ke estas devo de gepatroj certigi ke ilia infano lernu sciencan kaj literaturon. Li diris ankaŭ ke neniu kredo ion diritan de saĝulo, skribitan en libro aŭ asertatan de iu tradicio, se ne konforman al la racio.



Skribita kiel komuna bazo, pri kiu ĉiuj budhanoj povas interkonsenti.

H. S. OLCOTT, P. T. S.

Respekte prezentata al la plej altaj monaĥoj en la landoj reprezentataj ĉe la budhisma konferenco en Adjaro, Madraso, la 8an, 9an, 10an, 11an och 12an de januaro 1891 (A. B. 2434).

Japanio: Kozen Gunaratana, Chiezo Tokuzawa

Birmo: U. Hmoay Tha Aung

Cejlono: Dhammapala Hevavitarana

La Magha popolo en Ĉitagongo: Krishna Chandra Chowdry, tra lia nomumita reprezentanto Maung Tha Dwe.

Birmo:

Akceptita por la budhanoj en Birmo, hodiaŭ la 3an de februaro 1891 (A. B. 2434):

Tha-tha-na-baing Saydawgyi; Aung Myi Shwebôn Sayadaw; Me-ga-waddy Sayadaw;

Hmat-Khaya Sayadaw; Hti-lîn Sayadaw;  
Myadaung Sayadaw; Hla-Htwe Sayadaw; kaj  
dek ses aliaj.

Cejlono:

Akceptita por la budhanoj en Cejlono, hodiaŭ la  
24an de februaro 1891 (A. B. 2434):

Mahanuwara upawsatha puspârâma  
vihârâdhipati Hippola

Dhamma Rakkhita Sobhitâbhidhâna Mahâ  
Nâyaka Sthavirayan wahanse wamha

(Hippola Dhamma Rakkhita Sabhitâbhidhâna,  
plej alta monaĥo de Malwalta Vihara en Kandi)

Subskribite: Hippola

Mahanuwara Asgiri vihârâdhipati Yatawattê  
Chandajottyâbhidhana Mahâ Nâyaka  
Sthavirayan wahanse wamha

(Yatawattê Chandajottyâbhidhana, plej alta  
monaĥo de Asgiri Vihara en Kandi)

Subskribite: Yatawatte

Hikkaduwe Sri Sumangala Stipâdashâne saha  
Kolamba palate pradhana Náyaka Sthavirayo

(Hikkaduwe Sri Sumangala, plej alta monaĥo de  
Adam's Peak la distrikto de Kolombo)

Subskribite: H. Sumangala

Maligawe Prâchina Pustakâlâyadhyakshaka  
Suriyagoda Sonuttara Sthavirayo

(Suriyagoda Sonuttara, bibliotekisto ĉe Oriental  
Library ĉe la templo de la dentorelikvo en Kandi)

Subskribite: S. Sonuttara

Sugata Sâsanadhaja Vinayâ chariya  
Dhammalankârâbhidhâna Nayaka Sthavira

Subskribite: Dhammalankara

Pawara neruttika chariya Mahâ Vibhavi Subhuti  
i Waskaduwa.

Subskribite: W. Subhuti

Japanio:

Akceptita kiel parto de la norda budhismo

Shaku Genyu

(Shingon Shu)

Fukuda Nichiyo

(Nichiren Shu)

Sanada Seyko

(Zen Shu)

Ito Quan Shyu

(Zen Shu)

Takehana Hakuyo

(Jodo Shu)

Kono Rioshin

(Ji-Shu Shu)

Kira Ki-ko

(Jodo Seizan Shu)

Harutani Shinsho

(Tendai Shu)

Manabe Shun-myo

(Shingon Shu)

Ĉitagongo:

Akceptita por la budhanoj en Ĉitagongo

Nagawa Parvata Vihârâdhipati

Guna Megu Wini-Lankara,

Harbing, Ĉitagongo, Bengalio

## **Bibliografio**

*Budhisma kateĥismo* estis kompilita per propraj studoj en Cejlono, kaj parte el ĉi tiuj verkoj:

*Vinaya Texts*  
Davids kaj Oldenberg

*Buddhist Literature in China*  
Beal

*Catena of Buddhist Scriptures*  
Same

*Buddhaghosa's Parables*  
Rogers

*Buddhist Birth Stories*  
Fausbøll kaj Davids

*Legend of Gaudama*  
Bigandet

*Chinese Buddhism*  
Edkins

*Kalpa Sutra and Nava Patva*  
Stevenson

*Buddha and Early Buddhism*

Lillie

*Sutta Nipâta*

Sir Coomara Swamy

*Nagananda*

Broyd

*Kusa Jataka*

Steele

*Buddhism*

Rhys Davids

*Dhammapada*

Fausbøll kaj Max Müller

*Romantic History of Buddha*

*Udânavarga*

Rockhill

*Twelve Japanese Buddhist Sects*

B. Nanjio

*The Gospel of Buddha*

Paul Carus

*The Dharma*  
Same

*Ancient India*  
R. C. Dutt.

*The "Sacred Books of the East" Series*  
Max Müller, ed.

*Encyclopædia Britannica*